

Dum la kaftrinkado Pappermann diris al ni, ke ni atingus la Devil’s Pulpit:on hodiaŭ vespere. Li nur petis pri unu horo da restado ĉi tie ĉe la lago Kanubi, pro povi reĉirkaŭvidi tie. Ni tute ne kontraŭis pri tio. Ni eĉ estus lasinta plej ŝate multe pli da tempo al li. Sed la horo ne jam estis pasinta, kiam li jam revenis de sia ĉirkaŭirado kaj diris:

„Ni ekiru, se konvenas al Vi! Kaj kiam mi ĉirkaŭrampos tie ĉi plu, mi do trovos pli da maldolĉaĵoj ol dolĉaĵojn, kaj tion mi ja ne povas fari al mi maljuna ulo!“

Certe li pravis. Ankaŭ tiu lago Kanubi estis bele, tre bele, sed ĝia akvo ne havis por ni feliĉigan, sed plie elegian brileton, kaj tiel ĝi restis en mia memoro nur kiel la loko de mallonga resto, kiun devis sekvi denova migrado. Ni rajdis malsupren en la valon de la Purgatorio, kaj tie sekvis ĝian malvastan, kristale klaran fluon, kiu devis konduki nin al nia celo. Ni atingis ĝin, sed nur tiam, kiam preskaŭ jam malheliĝis, tiel ke mi proponis, resti hodiaŭ ankoraŭ ekster la ejo de la ‚diabla katedro‘, ĉar ni estis avertitaj pri tiu loko, kaj ne plu havis tempon pro antaŭe ekzameni ĝin pri ĉeesto de malamik-ecaj indianoj pro la malheleco.

„Well!“ Pappermann diris. „Do mi kondukas Vin al kaŝejo, kiun certe trovos neniu indiano, eĉ se li havas sufiĉe bonajn okulojn. Mi trovis ĝin nur per hazardo, kaj mi ne kredas, ke nun ekzistas alia homo escepte de mi, kiu konas ĝin.“

„Tio estas treege dirite!“ mi komentis.

„Sed ĉiukaze ĝuste!“ li respondis. „Ni devas plurajdi nur kelkajn paŝojn, kaj tiam sekvi etan flankakvaĵon, kiu fontas el trankvila, kaŝita lageto. Tiu lageto ne grandas. Altaj rokoj, kiujn oni ne povas transgrimpi ĉirkaŭas ĝin. Tiuj rokoj ne havas unu fendeton; fakte ŝajnas tiel. Sed kiam oni rajdas rekte tra la lageto ĝis la vidalvida flanko, oni faras la konstaton, ke jes tieas flanko fendeto, kiu klinite traigas kaj kondukas al la fakta fonto de la akvaĵo, kiu troviĝas ne en la lageto, sed pli profunde en la roko, ĵus tie, kie ni tranoktos.“

„Ĉu la fendo estas sufiĉe vaste por nia pakaro?“ mi scivolis.

„Jes“, li respondis. „Mi nur paku la tendobastonojn laŭlonge anstataŭ laŭlarĝe.“

„Kaj kiel profunde estas la lageto?“

„Maksimume metron.“

„Tiutempe!“

„Hm! Ĉu Vi do pensas, ke ĝi pliprofondiĝis? Tion mi neniam aŭdis dum mia vivo. Nefluantaj akvaĵoj kutime plimalprofundiĝas dum la tempo, sed ja ne pliprofondiĝas. Sed haltu! Jen ni estas ĉe la flankakvaĵeto. Mi do aliaranĝos la pakaron tie ĉi. Tiam ni rajdos al tiu flanko inter la rokojn.“

Ni helpis al li aliaranĝi la tendobastonojn. Estis ankoraŭ ĵus tiom da taglumo, ke ni povis vidi, kien ni rajdis. Ni atingis la lageton, kiu ŝajnis esti malhele kiel enigmo, tra-rajdis kaj vidis, alveninte je la alia flanko, ke fakte en la roko estis de densaj verdaĵoj surkreskita fendo, en kiu ni povis iri flanken. Tiam ni pluiris kelkan distancon laŭ la fluo krute supren, ĝis ni atingis ĝian fontejon, kiu estis en granda, cirkloronda roka truo, kies muroj, laŭŝajne, altiĝis orte kaj negrimpeble.

„Do! Tiu ĉi estas la loko!“ Pappermann diris. „Tie ni povas tendumadi cent jarojn, sen ke iu homo ektrovas nin.“

„Sed humide, tre humide, ĉu?“ mi demandis.

„Tute ne! La humidaĵo ja forfluas. Cetere nun estas indiana somero, jam dum semajnoj eĉ ne spuro da pluvo.“

„Ĉu oni povas grimpi tie laŭ la muroj supren?“

„Mi ne scias. Mi tiutempe ne provis tion. Mi neniam estis grimpemulo.“

„Kaj ĉu iu povas vidi malsupren de tie supre?“

„Tiukaze li unue grimpu supren de tie ĉi. De ekstere neniu kapablas tion.“

„Tiukaze mi estas trankviligita. Ni do ekbrulu fajron, pro poste starigi la tendon!“

Ambaŭ estis farita post duona horo. Ni ne alligis la ĉevalojn kaj la mulojn, tiel ke ili povis moviĝi kiel ili volis. Ili unue dece trinkis ĝissate. Tiam ili ruliĝis same dece sur la muskejo, kion ili ŝate faras nur, se ili estas sane je ostoj kaj artikoj. Kaj post tio ili trovis tiom da foliaj kaj aliaj verdaĵoj, ke ni povis senzorge resti tie plurajn tagojn, sen devi timi, ke mankis nutraĵoj por ili. Ili plie bezonis ripozadon ol nutraĵojn, ĉar la rajdado de la lago Kanubi ĝis tie ĉi estis fakte pli longa kaj elĉerpiga ol ni estis supozintaj per la vortoj de Pappermann. Ankaŭ ni mem sentiĝis lacigitaj. Tial ankaŭ ne daŭris longe post la vespermanĝado, ĝis ni kuŝiĝis. Kaj tio estis hodiaŭ tute alie ol hieraŭ. Hodiaŭ ni tuj ekdormis, kaj mi konfesu je mia malgloro, ke mi ne revekiĝis, ĝis Pappermann eldormigis min.

„*Mrs.* Burton jam estas vikle!“ li senkulpiĝis. „Ŝi jam mendis varmegan akvon pro — ĉu Vi aŭdas tion? Ŝi muelas la kafon en la tendo, pro ne veki Vin. Ja ne kontraŭu, ke mi tamen pensis ĝin esti bone fari puŝon al Vi! La viro ja ĉiam estu viro! Sed tio li ne estas, dum li dormas!“

„Do Vi vekis min nur pro mia digno, ĉu?“ mi ridis.

„*Yes*, Old Shatterhand kaj dormi, kiam sia edzino jam viglas! Tio neniukaze eblas!“

Nun mi rigardis al la loko. Ĝi estis tute jes aparte bela kaŝejo. Nenie estis eĉ ne la plej eta spuro, ke ajn iam antaŭe estis estinta homo je tiu loko. La rokmuroj estis tre krutaj, sed ne maltransgrimpeblaj. Tieis gigantaj arboj, kiuj aĝis plurajn cent jarojn, kaj iĝis per iliaj branĉoj kaj branĉetoj tiel dense al la rokaro, ke ili ebligis kaj faciligis la grimpadon. La „Juna Aglo“ apenaŭ estis trinkita sian kafon, kiam li komencis alteniĝi. Li sukcesis tion sen ia peno. Atinginte supre, eksonis lia laŭta voko:

„*Uf, uf!* Mi vidas miraklon, miraklon!“

„Ne tiel laŭte!“ mi avertis supren. „Ni ne jam scias, ĉu eble fakte estas homoj en la proksimo!“

„Neniu povas esti tie ĉi, kiu aŭdas nin!“ li respondis malsupren. „Tie estas ĉirkaŭe nenio escepte de aero!“

„Tiel alte! Kaj kio estas malsupre?“

„Devil's Pulpit!“

„La diabla katedro, ĉu? Ĉu vere?“

„Jes.“

„Tio neblas, tute neblas!“ Pappermann kontraŭis.

„Kial?“ mi demandis lin.

„Ĉar mi scias tion. Kaj kion scias Makŝ Pappermann, tion li scias dece! La vojo al la diabla katedro kondukas profunden maldesktrajn; sed ni flankeniĝis dekstren. Kaj ĝi estas ĉirkaŭita je ĉiuj flankoj de altaj, krutaj rokoj, kiun neniu homo povas laŭgrimpi. Kiel nu estas eble, ke li vidas ĝin!“

„Sed li asertas tion!“

„Li eraras!“

„Ĉu ne ankaŭ eblas, ke eraras Vi?“

„Ne!“

„Ke la vojo de tie ĉi al la diabla katedro havas kurbojn, kiuj trompas Vin, ĉu?“

„Neniu homo kaj neniu besto kaj neniu vojo povas tiel kurbiĝi, ke ĝi kapablas trompi min!“

Mi demandis la indianon pluan fojon, kaj li insistis pri sia aserto, ke li vidis la Devil's Pulpit-on. Ĉar ankaŭ li konis ĝin, tio kaŭzis kontraŭaĵo, kiu igis min sekvi la „Junan Aglon“. Mia edzino estas nemallerta grimpano. Ŝi tre ŝate vizitas montarajn regionojn, kaj prezentiĝas tie intertempe pli riskeme, ol mi rajtas permesi. Ŝi venis post mi. Sed Pappermann restis sidante.

„Mi ne estis ĉamo dum mia tuta vivo“, li asertis, „kaj mi ankaŭ ne ekestiĝos. Ebena vojo, bona ĉevalo kaj fikse bukita selo; tio estas, kion mi volas havi. Grimpu, tiel alten ajn kiel Vi volas; mi ne kunagas!“

Kiam ni alvenis supre, prezentiĝis belega elrigardo al ni. Mi neniam estis vidinta la diablajn katedron antaŭe, sed tuj konvinkita per la plej unua alvido, ke estis tiu, kiu situis tie antaŭ ni. Tion mi vokis malsupren al la maljuna okcidentulo. Jen li nu tamen stariĝis kaj komencis grimpi malrapide kaj gardiĝe alten. Daŭris sufiĉe longe, ĝis li atingis nin.

„Nu! Jen mi estas!“ li diris. „Nun mi do volas vidi malsupren pro ekscii, kia nekomprenebla sensencaĵo tie —“

Li ĉesis meze en la frazo, sed forgesis malfermi la buŝon.

„Pri kiu sensencaĵo Vi parolas?“ mi demandis.

„La sensencaĵo, ke, ke — Ĉiuj diabloj! Kio jen okazis al mi!“

„Nu, ĉu estas la Devil's Pulpit? Aŭ ĉu ĝi estas ne?“

„Estas ĝi! Ho Pappermann, Makŝ Pappermann, kia ega stultulo vi estas! Sed tio nur estas la kulpo de tiu malfeliĉiga nomo! Ĉar nur, kies nomo estas Pappermann, povas ŝargi sian konsciencon per tia teruriga hontigo! Tiu nomo, tiu nomo! Tiu estis mia malfeliĉo, kiel longe mi vivis! Se la nomo de mia patro estus estinta Müller aŭ Schulze aŭ Schmidt, aŭ laŭ mi ankaŭ Hanfstängel, Zuckerkant aŭ Pumpernickel, tiukaze mi estus estinta same feliĉulo kiel ankaŭ aliaj homoj. Sed Pappermann, Pappermann, tio estas la plej teruriga, kio ekzistas! Tio sekvumis min ĝis tie ĉi! Kaj tio ankaŭ sekvumos min plu, ĝis je mi estos nenio plu, kiu ĉiel povos esti sekvumeble!“

Li sentiĝis malfeliĉe en alta grado. Ja koncernis lian okcidentulan dignon, kiu estis grava por li kiel nenio alia. Per tia eraro neniu monta, arbara kaj savana migranto ne kulpiĝu, se li ne volas perdi sian bonan famon. Sed feliĉe ne ĉeestis iu, kiu emis kulpigi

lin pri tiu eraro, kaj kiam mi asertis al li, ke ankaŭ al mi tiaj malĝustaj kalkuladoj estis okazintaj jam ripete, li komencis trankviliĝi.

Oni imagu ebenan tegmenton, kies ŝtona balustrado konsistas el pezaj rokblokoj. Tiu tegmento estas kovrita per densaj arbedaĵoj, tiel ke, kiam oni staras tie supre, ne povas esti vidata de malsupre. Kiam oni paŝas al la balustrado kaj vidas malsupren, oni trovas, ke la rokmuro iĝas preskaŭ orte al la profundeco. Sur tiu ebena tegmento ni troviĝis, kaj profunde sub ni estis la diabla katedro.

Ajn kiu okupiĝis per termezurado, tiu scias, kiel oni imagu elipson. Sed ĉar miaj legantoj ne ĉiuj estas termezuristoj, mi volas esprimiĝi tie ĉi ne kiel termezuristo, sed kiel nefakulo, pro esti pli facile komprenata: Elipso estas cirklo, kiu estas tiel vaste tiritita, ke ĝi ricevis krom la unu mezpunkto duan plu. Tiuj du mezpunktoj ankaŭ estas nomataj fokusoĵoj. Ajn kiu havas fiŝbolkruceton en la kuirejo, tiu konas la longecan rondan formon de tia elipso. Kaj la fiŝbolkruceto ankaŭ estu imago de la longeca ronda montara valo, al kiu nia rokmuro formiĝis. Tiu valo do estis ekzakte tia elipso, kvazaŭ ĝi ne estis naskita ne de la naturo, sed de homa mano meze en la gigantan kompaktaĵon de la montamaso. Kiel mi vidis pli poste certe, la naturo ja estis antaŭlaborinta, sed la prikalkulanta forto de la homo posthelpinta. Tio okazis antaŭ multaj, jes, multegaj tempoj, kaj estis pasinta jam tiel longe, ke la rokmuroj, kiuj unue certe estis estintaj orte kaj nude, sed nun prezentis ŝiritajojn krevajojn, fendetojn, angulojn, eĝojn, kavaĵojn, altaĵojn kaj aliajn diferencigojn de la rekta lineo, sur kiuj kaj en kiuj iom post iom estis kunkolektiĝinta forta arba kaj arbeda kreskado, flanke de aliaj spicaĵaj, ŝtaŭdaj, herbaj kaj muskaj verdaĵoj. Ankaŭ la tero de la baseno estis kovrita de verdaj kreskaĵoj, sed rilate al tio mi faris du gravajn eksciojn. Fakte tie ĉi ŝajnis kreskaĵaro origine ne intencite, ĉar tieis tute malabunda subgrundo, kaj sendube tiu estis alportita tien per plena antaŭkalkulado, ĉar ajn kien la okulo povis vidi, tieis nur fruktodona tero. La arboj, kiuj staris tie sur la bazo de la baseno, ĉiuj, ajn maljune kaj forte ili estis, ne plu havis pintojn. Kaj kie ankoraŭ estis iuj, tie ili estis sekiĝintaj. Tio konkludeblis, ke ili nutriĝis nur de maldika, alblovita ternivelo, sed ne povis igi iliajn radikojn en la profundon, aŭ ne trovis nutraĵon tie. Kaj tute vere: Kiam mi pli poste venis malsupren kaj ekzamenis, mi trovis, ke kie vastiĝis la elipso, ĝia origina tero estis tiel dense, ke neniu kreskaĵo povis eniĝi, kovrite per dikaj ŝtonplatoj, sur kiuj establiĝis dum la tempo el humtero, per kiu nutriĝis la poste kreiĝinta arbaro kaj arbedaro. Borradiĵoj ne tieis. Tial la sekiĝinto de ĉiuj pintoj.

Kial tiutempe la kovrado de la tero per platoj? Tiu estis la unua demando, al kiu atentema kaj gardiĝa esploranto unue devis respondi tie ĉi.

La alia ekscio estis tiu, ke unu triono de tiu kreskaĵado ŝajnis esti komplete neniam tuŝita, dum oni tuj vidis je la aliaj du trionoj, ke homoj estis estintaj tie ĉi, fakte ne tro malofte. La limlineo inter la pli granda, tuŝita parto, kaj la pli malgranda, netuŝita, eĉ estis okulfrappe klara. Aspektis, kvazaŭ estis severa malpermeso iri sur tiun tre dense surkreskita triono de la elipso.

Kial kaj pro kiu celo tiu diferencigo? Tio estis la dua demando, kiun oni klarigu, kiam oni pretendis pri si mem valori kiel akra kaj prifidema observanto.

Kaj nun venas la ĉefaĵo, kiu posedis la plej altan intereson al mi. Fakte sur la alie komplete ebena, elipsaforma bazo de la valo du sufiĉe eminentaj, de homoj faritaj pli-altaĵoj, kiuj tute havis la aspekton, ke la baseno tiutempe estis farita nur per la intenco plenumi ĝin per akvo, kaj do estigi speco de lago, kaj el kiu la du altaĵoj stariĝu kiel insuloj. Dum la pasado de la jarcentoj la en- kaj elfluinta akvo estis eniĝinta tiel profunde, ke la tero de la baseno estis atingita, kaj ke ĝi estis sekigita simple per malplenfluo kaj pli posta fluĉeso.

Tiu observitaĵo per si mem estus rezultiginta nenion, krom en praa tempo estis estintaj homoj tie ĉi, kiuj rilate al iliaj konstruaĵoj kaj konsekvence ankaŭ al aliaj aĵoj rangis eminente pli alte ol al pli postaj indianoj, aŭ ni diru pli ĝuste, ol la pli postaj generacioj. Sed tiuj du altaĵoj — mi volas resti fidele al la imago kaj nomi ilin insulojn — havis la plej okulfrapan econ, ke ili situis rekte sur la du fokuso de la elipso! Tio ne povis esti hazardo, tio devis esti antaŭkalkulado. Jen ekestis la demando: Kiu estis la celo de tiu antaŭkalkulado? Iu ordinaraĵo, ĉiutagaĵo ĉiukaze ne. Mi pensis pri la malfacilaj, astronomiaj kalkuladoj, sur kiuj bazis la konstruado de la egiptaj piramidoj, pri la ankoraŭ neklarigitaj sekretoj de la aztekoj kaj aliaj templaj konstruaĵegoj el pli antaŭa tempo, sed mi estas nek fakulo nek sciencisto, kaj neeble povas riski komenci tiajn malfacilajn, sciencajn spekulaciojn. Sed unu penso tamen ekvenis al mi, kvankam la sinceremo devigas min konfesi, ke ĝi ŝajnis al mi esti eminente pli kuraĝeme, ol simpla okcidentulo, kiu havas nur la intencon gardi sian sekurecon, rajtas permesi al si. Sed ĝi ree kaj ĉiam ree aperis; ĝi regis min pli kaj pli forte, kaj ne relasis min. Estis la penso pri tiuj en la arkaikaj tempoj eĉ konstrue efikigita fakto, ke oni en certa geometria figuro je unu certa punkto klare aŭdas tion, kio estas parolata mallaŭte je alia, fora punkto. Tiu penso venis sen mia propra volo, do sen ke mi pripensadis. Mi rifuzis ĝin. Sed ĝi revenis, kiam la „Juna Aglo“ komencis paroli, kaj ekde tiam ne recedis plu. La indiano fakte montris de tie supre, kie ni staris, malsupren al la profundo kaj diris:

„Tiu estas la katedro. Ni staras sur la plej alta parto de la muro, de kiu ĝi estas ĉirkaŭata. Estas du katedroj. Unu, fakte tiu ĉi, estas konata al la palvizaĝoj; sed ili scias nenion pri la alia. Tiu unu estas nomata de ili la Katedro de la Diablo; la alian ili certe nomus la Katedro de la Bona Manitou. La ruĝaj viroj sed nomas tiun ĉi ‚*Tša Manitou*‘, kaj la alian ‚*Tša Ketike*‘.“

„Kiun punkton Vi nomas Katedron?“ mi demandis lin. „La longeca rondo de tiu valo vastiĝas de oriento okzidenten. Estas altaĵo en la orienta kaj alia en la okzidenta parto. Kiu el tiuj estas la Katedro?“

„Tiu en la okzidenta parto“, li respondis.

„Do la alia estas la Orelo, ĉu?“

Li vidis al mi kaj ne sciis, pri kio mi parolis. Tial mi klarigis al li:

„Kutime oni ja paroladas de la Katedro malsupren. Kaj kion paroladas la parolanto, estu aŭdata. Sed Vi menciis tie ĉi Orelon, kiu aŭdas. Vi nomis ĝin la ‚Orelo de Dio‘. Kie ĝi estas?“

„Tion mi ne scias. Ĉiukaze estas preparolata la sama punkto, kiun la blankuloj nomas Katedro. Kion mi scias pri tio, tion mi eksciis de Tatela-sata, mia instruisto. Je tiu unu

Katedro, fakte je tiu ĉi, aŭdas Dio, kion parolas la diablo, kaj kondamnas lin al pereco. Kaj je la alia katedro, kiu ankoraŭ ne estas konata al la blankuloj, aŭdas la diablo, kion parolas Dio, kaj per tio estas liberigata de la pereco.“

„Tiu estas profunda, tre profunda senco, kiu ĉiukaze estas ajn ie kaj ajn kiel tie ĉi kvazaŭ kovrita per eksterna vestaĵo, kiun mi serĉos. Vi ja vidas, ke la orienta parto de la valbazo estas vera kreskaĵa densejo, dum la okcidenta, pli granda parto estas eminente malpli kovrita. Ŝajne oni eĉ renversbatis lignon pro bruligi fajron.“

„Tion oni ĉiam faras, kiam oni kuniĝas tie ĉi pro konferencado.“

„Pro konferencado, ĉu? Sed ja ankaŭ pro ĉasado aŭ alia celo, ĉu?“

„Ne. Tiu ejo estas sankta al ĉiu ruĝa viro. Ĝi estas dediĉita nur al eminentaj, gravaj konferencadoj, kiuj estas farataj inter diversaj nacioj. Neniam oni interparolados tie ĉi pri negravaĵoj! Kaj neniam ruĝa viro venos al tiu loko, sen ke okazu granda kunveno de du aŭ pluraj nacioj!“

„Ha! — Ĉu vere?“

„Jes“, li asertis. „Mi scias tion tute ekzakte! Kaj eĉ dum eminentaj interkonsiladoj, kiam multaj, multaj militistoj kuniĝas tie ĉi, neniu el ili riskos iri en la orientan parton de tiu ĉi loko.“

„Kial?“

„Oni diras, ke tie loĝas la malica spirito, la diablo, laŭ kiu oni nomas tiun Katedron.“

„Eminente strange kaj eminente malklare! Kion oni rakontas pri tiuj du Katedroj estas tutcerte multajn cent jarojn aĝe. Tiel oni povas facile pensi, kiel ege oni forviŝis la verecon. Ĉu Vi kredas al tio?“

„Mi kredas al la kerno de tiu vereco.“

„Ĉu Vi konas ĝin, tiun kernon?“

„Ne. Sed mi esperas, ke mi ekscios ĝin de Tatela-sata.“

„Estas demando, ĉu li mem konas ĝin. Se ĝi estus konata al li, li estus esprimiĝinta alimaniere, kiam li parolis pri tiu ĉi Katedro. Li ne estus nominta la saman punkton Katedro kaj Orelo. Ĉu ankaŭ Vi kredas, ke tie en la orienta parto de la placo loĝas la malica spirito, la diablo?“

„Mi respektas la kutimojn de miaj patroj, sen demandi, ĉu ĝi bazas sur vereco aŭ ne.“

„Vi do evitos iri al la sankta loko tie malsupre, ĉu?“

„Ĉu *Mr.* Burton malsupreniros tien?“

„Jes, mi iros.“

„Ĉu eble ankaŭ *Mrs.* Burton?“

„Jes, tutcerte ankaŭ ŝi.“

„Do mi ŝate kuniros, se ambaŭ deziras tion. Mi estis ĉe la palvizaĝoj kvar jarojn, kaj lernis de ili diferencigi inter la animo de aĵo kaj la aĵo mem. La animo estas sankta al mi; sed mi ne respektas ĝian videblan formon. Sed mi respektas ĝin, kaj lezus aŭ eĉ disŝirus ĝin nur, kiam mi havus kaŭzon, kiam mi pensus, ke ĝi estas malica, do danĝera.“

Kiel tiu juna indiano parolis! Se li ne estus estinta tiel simpatie al mi, li estus ekestinta nun. Nun demandis Pappermann, kiu ĝis tiam estis konduktinta silente:

„Mi aŭdis, ke Vi volas iri tien malsupren?“

„Memkompreneble! La Devil’s Pulpit ja estas nia celo!“ mi respondis.

„Kiam?“

„Tuj!“

„Do ni surmetu la selojn.“

„Ne necesas. Ni iros piede.“

„Ho ho!“ li elvokis mirigite. „Ĉu Vi kredas, ke Makŝ Pappermann irados, kiam li tenas kondukilon de ĉevalo aŭ mulo en la mano?“

„Tion mi certe ne kredas. Sed same neniu devigis Vin iradi. Fakte Vi restos tie ĉi.“

„Ĉu mi — restos — tie ĉi —?“ li demandis mirigite.

„Jes.“

„Ĉu do mi ne meritas kuniri?“

„Ne parolu sensencaĵon! Mi bezonas Vin tie ĉi supre pli nepre ol tie malsupre. Ni scias, ke venos la malamikoj. Sed bedaŭrinde ni ne scias certan tempon. Ili povas ekaperi ĉiun momenton. Ili povas ekaperi ĵus tiam, kiam ni estas tie malsupre, kaj ni ne vidos ilin veni. Ĵus tial mi ja intencas iri, ne rajdi. Ĉevaloj kaŭzas multe pli videblajn spurojn ol homoj. Kaj povus okaziĝi, ke ni eble povos feliĉe saviĝi, sed devus, pro tiam ankaŭ savi ilin, malkaŝiĝi kaj endanĝeriĝi —“

„Ha! Mi antaŭsentas, antaŭsentas!“ li interrompis min.

„Nu, kion Vi antaŭsentas?“

„Ke mi restu tie ĉi supre pro gardadi, esti atente?“

„Fakte jes!“

„Tiukaze estas alia afero! Mi faros tion ŝate kaj petas min informi.“

„Tio estos tre rapide farita. Ni scias, ke venos la jutoj kaj la suoj. La unuaj estas ekspektendaj de la nordo, la aliaj de la okcidento, tiel ke ili ne povas veni de la flanko, de kiu ni venis hieraŭ, sed de la kontraŭa. Kaj tiu flanko estas tie supervideble tiel klare kaj ĝisdetale antaŭ Viaj okuloj, ke Vi certe ekrimarkos la ruĝulojn jam longe, antaŭ ili venos. Tiam Vi donos signon al ni.“

„Kian?“

„Longan, akran fajfon.“

„Ĉu tiel?“

Li metis la kurbitan montrofingron en la buŝon kaj aŭdebligis probon.

„Jes, tio sufiĉas.“

„Bone! Sed kio pri la vojo malsupren al la Katedro? Vi ne jam estis estinta tie malsupre.“

„Ankaŭ ne necesas. La Juna Aglo‘ ja konas ĝin. Kaj eĉ, se tio ne estus la kazo, Vi ja do ne vere kredas, ke mi perdos la vojon, post ke mi vidis la Devil’s Pulpit:on de tie ĉi tiel klare antaŭ mi! Venu!“

Ni rerampis malsupren al la restejo; nur Pappermann sole restis supre. Mi prenis la dismetitan Henry-pafilon el la kofro, kaj mi kunŝraŭbis ĝin.

„Ĉu Vi volas pafi?“ la Koretinjo demandis.

„Ne timiĝu. Mi nur pensas pri sovaĝaj bestoj“, mi trankviligis ŝin. „La Juna Aglo‘

ankaŭ kunprenos sian pafilon.“

Ŝi kaŝe mansignis al li. Mia vido iĝis same kaŝe al la indikita direkto. Mi vidis, kion ŝi volis signi al mi.

Estis kortuŝe, per kia meditada streĉeco li vidadis al la pafilo kaj rigardis ĉiun manmovon, kiun mi faris, dum mi ŝargis ĝin.

„Uŝ!“ li diris. „Tiu ĝi estas! Do tiu estas ĝi! Kiel ofte mi aŭdis paroli pri li! Ĉu mi rajtas tuŝi ĝin unu fojon?“

„Jen ĝi!“

Li prenis ĝin per sia mano, sed sen permesi al si mem ekzameni ĝin detale. Tiam li premis ĝin al si kiel en subita trosento kaj diris:

„Kiel ofte Winnetou estis savita per ĝi, kiel ofte! Unu sola, unu sola pafilo!“

Post tiuj vortoj li redonis la pafilon al mi. Mi prenis ĝin kaj respondis:

„Tiel sole, kiel Vi pensas, ĝi estas jam delonge ne plu. Jes, oni ridis pri mi, kiam mi parolis pri dudek kvin pafoj. Estis eĉ ruzaj, tre ruzaj homoj, kiuj pro tiu ĉi pafilo nomis min mensoganto kaj trompanto, kvankam ili sciis tiel malmulte pri pafiloj kaj la pafado, ke mi preskaŭ sentis kompaton. Sed nun estas pasinta tiom da tempo, ke mi ne nur estas pravigita, sed eĉ subigita. En Italujo elpensis majoro Cei-Rigotti dudekkvinpafan armean pafilon, kaj al la angla militministro estis prezentata eĉ dudekokpafan, kiu pafas ĝis distanco de 3100 metrojn, de skota elpensisisto. Cetere tiu ĉi pafilo je iama tempo iros laŭ la sama vojo, kiun nun iras la arĝentopafilo de Winnetou.“

„Ĉu Vi ankaŭ kunhavas tiun?“ li demandis, dum liaj okuloj brilis.

„Jes.“

„Ĉu mi rajtas vidi ĝin?“

„Pli poste. Nun ni ŝparu ĉiun momenton pro la esplorado de la Devil's Pulpit, ĉar kiam la malamikoj estos alvenintaj, estos tro tarde pro tio. Ni ne perdu tempon.“

Kiam mi diris tion, ni aŭdis ridadon super ni. Estis Pappermann. Li venis degrimante. Li jam preskaŭ estis atinginta nin; kiam li diris:

„Jes, resti supre, tion mi faru! Kaj tiuj tri saĝaj homoj volas iradi! Sed ili tamen devos rajdi! Kaj ili bezonos min dum tio, eĉ tree.“

Kiam li diris tion, mi ekkomprenis, kiel li pravis. La Koretinjo sed demandis:

„Ĉu rajdi? Kaj ankaŭ bezoni Vin dum tio? Certe ne! Ni irados!“

„Ne, Vi rajdos!“ li ridis gaje. „Vi certe foje devos obei al mi, tute egale, ĉu Vi volas aŭ ne! Aŭ ĉu *Mrs. Burton* eble volas ekhavi malsekajn piedojn, malvarmumon, tusadon, kataron kaj aliajn belajn aĵojn? La ternadon tute ne enkalkulite!“

Tio fakte estis tre prave. Okcidentulo certe ne longe demandas, ĉu li malsekiĝas aŭ ne, sed kiam li povas eviti tion, li konsentas. Ni do ĉiuj surĉevaliĝis kaj elrajdis, tra la laĝeto. Tiam Pappermann kondukis la ĉevalojn reen. Ni sed sekvis la mallarĝan fluaĵon malsupren, ĝis ni atingis la lokon, kie ni estis deĝintaj hieraŭ de la direkto al la Diabla Katedro. De tie la plej granda rivereto devis esti nia gvido, ĝis ĝi estiĝis tro riskeme kaj faliĝis per diversaj saltoj kaj kaskadoj rekte en la profundon. Tion ni ne povis kunfari. Ni do paŝis malrapide kaj per komfortaj serpentecaj kurboj malsupren, kaj faris la ekkonon dum tio, ke ni tie ne povis sekvi la rektan direkton, sed devis fari sufiĉe

eminentan kromvojon, kion Pappermann sed ne estis enkalkulinta; ĵus tio estis kondukinta lin al la erara supozo, ke tio, kion vidis la ‚Juna Aglo‘, ne povis esti la Diabla Katedro.

Alveninte malsupre en la profundeco, ni unue vidis la malvastan fendon, kiun la akvo estis preskaŭ orte frotinta en pratempa epoko en la rokon. Preskaŭ aspektis, kvazaŭ ĝi estis entrancita per giganta segilo. Tute la samo ankaŭ estis okazinta vidalvide al ni je la eliro de la valo. Do estis pruvita, ke ĝi estis forminta duone naturan, duone homfaritan lagon, kaj pli poste, kiam la akvelfluo estis atinginta ĝian grundon, estis sekiĝinta. Pro kio tieis tiuj du insuloj? Ĉu nur pro tio, esti simple nur insuloj? Tio ne volis komprenebliĝi al mi. Same grave estis al mi la demando: Ĉu tiu celo estis atingita per la akvo, tiel ke nun, kiam neniuj akvo tieis plu, ankaŭ tio ne plu povis ektrivata? La rivereto certe ankoraŭ tieis. Ĝi ankoraŭ fluis laŭlonge tra la tuta valo. Sed ĝi ne povis iĝi tra la ŝtonplatoj, kaj ne bori pli profundan ingon por si mem, sed ili estis ĝia grundo, per kiu ĝi estis konstruita kaj fortigita al si mem per alnaĝigita ŝtonaro ĝiajn proprajn bordojn. De ĝi ni estis kondukataj unue en la orientan, pli dense surkreskitan parton de la valo, sed ne restis tie, sed ŝparis tion al ni por pli poste, ĉar unue gravis konatiĝi al la okcidenta parto de la tereno, ĉar de tie la ruĝuloj estis ekspektendaj. Antaŭ ĉio ni devis esti finiĝintaj pri tio, kiam ili venis.

En tiu okcidenta parto estis kelkaj lokoj, je kiuj elstaris la ŝtonplatoj el la disfosita tero. La arboj ne estis altaj, kaj la arbedoj ne densaj. Vere tro multe ili devis esti brulaĵoj por restejaj fajroj. La lokoj, kiuj troviĝis inter ili, estis tiel grandaj, ke centoj da restantoj povis trovi spacon, sen interĝeni per troa proksimo. La ĉi tiea insulo estis pli alta ol la plej alta arbo, kio sed ne signifas tro multe, ĉar la arboj ja ne havis eminentan altecon. Ĝi ne estis surkreskitaj per verdaĵoj, sed tute nude. Aro de ŝtupoj kondukis supren. Supre en la mezo estis alta, ŝtona seĝego, kaj runde ĉirkaŭ tio cirklo de pli malaltaj seĝoj. Tio estis la ‚Diabla Katedro‘, sur kiu devis interkonsiladi la ĉefoj, kaj poste anonci la rezulton per parolanto al la supre amasiĝita homaro.

Ni paŝis supren. Estis videbla ne la plej eta aĵo, kiu estus estinta priatentende. Memkompreneble mi de tie ĉi, sed sen diri ion pri tio, rigardis la alian, en la orienta parto situanta insulo. Ĝi estis ekzakte same alte kiel tiu ĉi, sed pli larĝe kaj krome dense surkreskita. Ankaŭ ĝis ĝia supraĵo neniuj el la arboj altiĝis, kaj se vere, kiel mi pli kaj pli supozis, tio estis akustika sekretaĵo, estis sur nia nuna altaĵo ĉie ĉirkaŭe neniuj aĵoj, per kiuj la sonondoj povis esti forkaptataj aŭ interrompataj. Post tio ni repaŝis malsupren. Ni estis finiĝintaj pri tiu parto de la valo kaj foje vidis al la alteco, ĉu eblis vidi nian Pappermann-on. Ĉiukaze li rigardis nin; sed ĉar li verŝajne estis tiel ruze ne riski iri ĝis la rando, ni ne povis vidi lin.

Nun ni iris al la alia, pli dense surkreskita parto de la elipso. Mi direktiĝis tie rekte al la dua insulo, sed ĉesigis jam baldaŭ mian hastan paŝadon, ĉar mi ektrivis spurojn, sed feliĉe tiajn, kiajn oni kutime ekvidas ŝate, tre ŝate. Ankaŭ al la ‚Juna Aglo‘ tuĵ rimarkis ilin. Preskaŭ aspektis, kvazaŭ infanoj ripete estis rompe trairintaj tra la rubus-ujoj. Ni unue silentis, sed kiam ni estis kaŝirintaj unu fojon ĉirkaŭ la insulo, kaj nun sciis, kion ni devis pensi, mi demandis:

„Koretinjo, ĉu vi havas apetiton pri ursoŝinko aŭ ursmanegoj?“

„Mia teruro!“ ŝi respondis rapide kaj tuj ekscitigite. „Ĉu do ĉi tieas ursoj?“

„Jes.“

„Ĉu eble eĉ grizursoj?“

„Ne. Ne estas tiel malbone. Estas tute ordinare sendanĝera nigra urso, kiu lamas per la maldekstra malantaŭa kruro. Ŝajnas, ke ĝi iam estis lezita, do tial devis malkutimiĝi sian danĝerecon. Mi supozas, ke ĝi estas pasia vegetarano, kiu faros eĉ ne la plej etan penon al si aperi antaŭ vi kiel karnomanĝanto. Ĝi estas tie supre sur la insulo.“

„Ĉu tie supre?“ Ŝi vidis supren kaj tiam aligis: „Vi pravas! Mi vidas ĝin! Tie ĝi vidas malsupren! Tie, tie!“

Ŝi montris supren per la mano. Tiam jam la „Juna Aglo“ levis sian pafilon.

„Ne pafu; ne pafu!“ ŝi petis. „Ĝi havas tro karan, ridigan vizaĝon!“

Sed ŝia deziro jam venis tro tarde. La pafo krakis. La kuglo estis celigita al la okulo kaj iĝis rekte en la cerbon. La urso estis kuŝinta dense al la rando de la insulo kaj estis farinta ekmoviĝon, kiam ĝi vidis nin, pro ekstari. Nun ĝi falis reen, ruliĝis per la efiko de la pafo foje antaŭen kaj tiam glitante venis malsupren al ni, pro ekresti morte antaŭ niaj piedoj.

„Kiel domaĝe, kiel domaĝe!“ la Koretinjo diris. „Ni povis lasi ĝin vivante!“

„Pro ĝia propra turmento, ĉu?“ mi demandis, dum mi ekzamenis ĝin. „Vidu jen! Ĝi ne estis lezita, sed ĝia malantaŭa kruro estis rompiĝinta, kaj ĉar neniuj universitata kliniko volis akcepti ĝin, tial ĝi peze tiris ĝin malantaŭ si, ĝis nia kuglo savis ĝin.“

„Sed mi ne manĝos rompitaĵajn krurojn!“ ŝi energie deklaris.

„Mi ankaŭ ne!“ mi konsentis. „Nepre ili unue devas esti rekunigataj kaj tiam bandaĝataj, memkpreneble per gipso. Post tio oni lardas kaj rostas ilin, kaj tiam oni manĝas ilin!“

„Vi estas fimokema homo!“ ŝi riproĉis min, duone ridante kaj duone serioze. „Kio nun okazu al la urso? Mi ne portos ĝin supren, kien ni loĝas.“

„Do ĝi estis alportata de nia Makŝ! La urso estas pli ol kvar jarojn aĝa, kaj certe pezas kelkajn centfuntojn, sed ni ja havas mulojn pro porti ĝin. Ni devas forigi ĉion, ne povas lasi ion da ĝi tie ĉi pro la indianoj, kiujn ni ekspektas. Nun ni demetos ĝian veston.“

Tio okazis tre rapide. La „Juna Aglo“ helpis kaj prezentiĝis lerte kaj dece. Kiam ni tiam estis remetintaj la beston en sian propran felon ni pluis niajn interrompitaĵajn esploradojn. Ankaŭ tie ĉi suprenkondukis ŝtupoj, kiuj sed estis preskaŭ nelaŭirebligataj per kreskaĵoj. Je ambaŭ flankoj de tiuj ŝtupoj estis granda ŝtontabulo kun sufiĉe bone konserviĝintaj ĉizaĵoj. Tutcerte tiuj tabuloj estis farigitaj nur tiam, kiam la baseno ne plu havis akvon. Ili surhavis bildigojn de la insulo. Sur la unua tabulo ni vidis viran figuron, kiu volis iri supren. Sur la dua videblis supre teruriga monstro, kiu glutegis tiun riskemulon, jam antaŭ li estis suprenirinta. Do averto iri sur la insulon! Kial tio? Do fakte tie ĉi io estis, kion neniuj rajtis scii! Ni supreniris.

Alveninte supre, ni vidis, plene surkreskita de arbedoj, malgrandan, malaltan konstruaĵon, ĉirkaŭe simile al terengardista dometo, sed konsistanta el ŝtonplatoj, kaj la muroj kaj la tegmento.

Rekte flanke de tio la urso estis aranĝinta sian restejon. Interne estus estinta certe pli komforte, sed li ne povis eniĝi, ĉar la pordo estis malfermita. Ĝi pendis en stara hingŝo, kiu estis konstruita en la platon mem. Ni malfermis. La dometo malplenis. Povis sidi kvar personoj tie, sed ne pli. Pro kiu tiu dometo estis konstruita? Ĉu pro la kaŝaŭskultanto? Li sidis tie kaŝate kaj nevidate. Sur la alia insulo sed nek estis tia dometo nek kaŝigajn arbedojn. Li do povis vidi ĉion; sed ili, kiujn li rigardis, ne vidis lin.

Kroma ektruvo ankaŭ tie ĉi supre ne estis farebla, fakte per la tre eminenta kaŭzo, ke tieis tute nenio plu. Se la sekreto, kiun mi serĉis, vere ekzistis, ĝi certe ne bazis sur sagacaj, ruzegaj komplikaĵoj, sed sur la elstare simpla uzado de nura natura leĝo. Mi estis scivolema je plej alta grado, sed ankoraŭ nun tenis miajn pensojn sekrete. Sed mi ne hezitis fari la decidigan probon. Mi petis mian edzinon reeniri kun la „Juna Aglo“ al la alia insulo, kaj tie sidiĝi sur la grandan seĝon de la ĉefoj.

„Pro kio?“ ŝi demandis.

„Pro surprizo, kiun mi volas fari al vi.“

„Ĉu bona?“

„Jes, bona. Se ĝi sukcesos, vi ĝojos! Aŭ ĉu vi pli ŝate volas estis surprizita malbone? Tion mi ankaŭ povas!“

„Nel! Pli ŝate bone! Sed, ĉu tio vere necesas?“

„Jes! Tute nepre!“

„Ekde kelka tempo vi ja estas tiel elstare sekretoplene! Esperinde tio iam forpasos! Mi obeos.“

Ŝi foriĝis kun la apaĉo. Mi paŝis al la rando de la insulo kaj rigardis post ili. Mi vidis ilin ambaŭ iri trans la placon, interparolante, ĝis la „Katedro de la Diablo“. Ili supreniris. Mi diru, ke mi estis ege streĉiĝite. Mi aŭskultis.

Tiam eksonis, ne antaŭ mi, kien mi rigardis, sed malantaŭ mi, la gaja voĉo de mia edzino:

„Li ne trankviliĝos antaŭe! Li insistados, ĝis li ekkonis tiun „orelan“ kaj „katedran“ aferon! Mi konas lin!“

Ili staris nun ambaŭ supre sur la insulo. Mi estis aŭdinta tion, kion diris mia edzino nur ekde la momento, je kiu ŝi estis aperinta en la alteco de la Katedro. Mi vidis ŝin stari, sed ne klare. Mi ne povis rekoni la vizaĝojn; pro tio la distanco estis tro granda. Ankaŭ la brakaj kaj manaj movoj estis nevideblaj al mi. Post la lasta vorto ekestis paŭzo; tiam mi denove aŭdis la Koretinjon:

„Ne; mi ne havas ideon. Li ja ne estis havinta tempon ĝin diri aŭ klarigi al mi.“

Per tiuj vortoj estis konkludeble, ke la apaĉo ankaŭ estis dirinta ion, kio sed ne trafis mian oreton. Verŝajne mi staris malĝuste, fakte tiel, ke la sonondoj, kiuj venis de lia buŝo ne povis atingi min. Mia edzino estis ĉesirinta je la rando de ŝia insulo. Tiel mi ankaŭ staris. La „Juna Aglo“ sed staris plurajn paŝojn for de ŝi en la mezo. Tial ankaŭ mi forlasis la randon kaj iris al la mezo. Tiu sed estis tie ĉi ĉe mi ĵus tie, kie estis la dometo, do profunde en la arbedaro, kaj do estis la demando, ĉu tiuj arbedoj ne forkaptos kaj tiel neaŭdebligis la sonondojn. Sed tio ne estis la kazo. Ĉar apenaŭ, ke mi estis atinginta la dometon, mi aŭdis mian edzinon diri multe pli klare ol antaŭe:

„Bedaŭrinde mi neniam antaŭe roŝtis urŝon. Mi do devas fidiĝi tute pri Vi. Ĉu la manegoj vere estas la plej bona aĵo? Tiel delikate, ĉu?“

Tute same klare mi aŭdis post tio la junan apaĉon respondi:

„Sen ĉia dubo! Fakte ne ekzistas io pli delikata!“

„Kaj ĉu ili vere kuŝadu tiel longe antaŭe, ĝis ili havas vermojn?“

„Fakte jes.“

„Fi!“

„Kial fi? Oni forigas la vermojn. Oni ja ne kunmanĝos ilin!“

„Sed tamen ili tieis! Tio naŭzas!“

„Tiukaze oni ne atendas tiel longe!“

Mi nun faris la ŝercon ekintervoki per laŭta voĉo:

„Neniukaze! Oni nepre atendu, ĝis ekestas la vermoj! Tiam la manegoj estas roŝtataj; sed la vermojn oni donas kiel nutraĵon al la rubekoloj kaj najtingaloj!“

Rekte tuj mi aŭdis la Koretinjon diri ridante:

„Jen mia edzo, la ŝercemulo! Li kaŝradis post ni. Kie li nu estas?“

Mi supozis, ke ŝi ĉirkaŭiris serĉante min. Mi ne plu povis vidi ŝin. Tial mi vokis:

„Ĉi tie mi estas, — tie ĉi!“

„Nu kie?“ ŝi demandis.

„Ĉi supre! Ĉe Makŝ Pappermann!“

„Ŝerco! Diru serioze!“

„Nu bone: Mi sidas tie sur la plej proksima arbo!“

„Nenio, nur petolaĵo! Bonvolu ekseriozi kaj paroli prudente!“

„Tute kiel vi volas! La ‚Juna Aglo‘ metu sian manon en sian maldesktran jakpoŝon. Tie mi estas!“

„Uf, uf!“ la menciito vokis. „Nun mi scias, nun, nun!“

„Kion?“ ŝi demandis.

„Li ne ĉeestas, tute ne tie ĉi! Lia voĉo sonas foje de supre, foje de malsupre, foje de dekstre kaj foje de maldekstre. Li ankoraŭ staras tie, kie ni forlasis lin; sed li ektrovis la eblecon sendi sian voĉon al ni tien ĉi!“

„Ĉu tio veras?“

„Certe!“

„Tiukaze tiu nu estus la surprizo, pri kiu li parolis, ĉu?“

„Tre verŝajne. Vi ĵus diris, ke li ne trankviliĝos, ĝis li ektrovis tiun ‚orelan‘ kaj ‚katedran‘ aferon. Nun li povas trankviliĝi. Li jam ektrovis ĝin!“

Tiam mi intervokis:

„Li pravas. Mi trankvilas!“

„Kie?“ ŝi demandis.

„Ĉi tie sur mia insulo, mi staras antaŭ la dometo.“

„Ĉu vere? Aŭ ĉu vi ankoraŭ mistifikas?“

„Ne. Nun mi seriozas. Mi nun kondutas dece. Mi staras vere tie ĉi ĉe la insula dometo kaj aŭdas vin same bone, kiel Vi aŭdas min. Tion mi antaŭsentis. Mi klarigos la cirkonstancojn al vi. Mi sendis vin al la alia insulo pro fari probon pro mia supozo. Ĝi

sukcesis. Ĝi kontentigas min eminente.“

„Se estas tiel, kiel vi diras, ĝi preskaŭ estas kiel miraklo!“ ŝi elvokis.

„Kaj fakte tute ne estas miraklo, sed nur la ruza, prizorga uzado de simpla natura leĝo.“

„Do nun ni povas de tie, kie vi nun estas, kaŝaŭskulti la intertraktadojn de la indianoj!“

„Jes! De la komenco ĝis la fino! En ĉia komforteco kaj sekureco!“

„Ĉu vi do vere aŭdas min tute klare?“

„Ekzakte tiel, kvazaŭ vi nun starus ĉe mi!“

„Mi vin same!“

„Bele! Sed ni tamen faru probon pri la forteco aŭ malforteĉo de la sono kaj pri la punkto, sur kiu oni staru pro ne malkapti eĉ nur vorton!“

Ankaŭ tiu probo estis sukcesata tre bone. Nur kio estis frustrata ne estis kompreneble; sonis kiel spiro, kiu ne enhavas vortojn. Kaj kiam oni vokis laŭte, krakis, bruis preskaŭ kiel tondro. Oni preskaŭ povis ektimiĝi pri tio. Dum tio la klareco malaltiĝis je grado, sed nur je tre malgranda. Sed ĉio, kio estis inter tiu frustrado kaj tondrado sonis ekzakte tiel, kvazaŭ oni troviĝis ne je du tiel malproksimaj punktoj, sed sur unu sama loko. Finfine la gardiĝema kaj ĉiam certiĝema Koretinjo proponis interŝanĝi foje niajn du poziciojn.

„Vi venu tien ĉi al mia insulo, kaj mi venos al la via“, ŝi diris. „Survoje ni renkontiĝos. Sed vi metas ajn ion, kion mi nun diras al vi, en la dometon, pro ke mi konvinkiĝos, ke vi nun vere troviĝas tie.“

„Do vi ankoraŭ nun pensas, ke mi ŝercas, ĉu?“

„Ne, ĉar vi ne estas tie ĉi ĉe ni, ankaŭ ne en nia proksimeco. Ni vidus vin. Sed mi scias pri via akustiko kaj viaj naturaj leĝoj tiom malmulte, ke mi povas fidi nur pri miaj propraj okuloj, sed ne pri la scienco aŭ eĉ pri la ŝercemulo, kiu vi estas!“

„Do diru, kion mi metu tien ĉi? Mian horloĝon, mian tranĉilon, ĉu?“

„Ne, sed ion poezian!“

„Nu, kion?“

„Amleteron!“

„Ho ho! Al kiu?“

„Al mi, memkompreneble. Ja ne ĉeestas iu alia virino. Do ŝiru folion el via notlibro kaj skribu sur ĝin, kion mi nun diktas al vi!“

„Bone! Jen la folio, kaj ankaŭ la krajono. Nun parolu!“

Ŝi diktis tion:

„Mia kara Koretinjo! Mi amas vin kaj restos fidele al vi ĝis en la morton. Pro via neksta naskiĝa datreveno vi ricevos kvindek markojn por la malsanulejo de Radebeul. Mi promesas tion kaj subskribas tion per mia propra nomo!“

„Sed nun ankaŭ subskribu!“ ŝi aligis.

„Estas ĵus farita!“ mi anoncis.

„Do venu!“

Mi metis la folion en la dometon, paŝis malsupren de mia insulo kaj iris al ŝia. Survoje ni renkontiĝis. Ŝi volis ĵeti al mi triumfantan vidon al mi pro la kvindek markoj,

sed ne sukcesis tion. Ŝi des plie donis sian manon al mi pro danki, kaj tiam pluiris kun la „Juna Aglo“. Mi hastis pro rapide atingi la alian insulon. Kiam tio estis okazita kaj mi tiam staris supre, mi kondukis tre mallauĉe kaj aŭskultis. Tiam mi aŭdis ilin veni. Ili interparolis. Klarinjo tuj iris al la dometo. Mi aŭdis ŝin diri:

„Tie estas la folio! Vere, vere!“ Ŝi legis ĝin kaj tiam aligis: „Ekzakte tiel, kiel mi diktis ĝin! Do ne povas plu esti dubo —“

„Sed jes!“ mi rapide interrompis ŝin.

„Ha, vi ankaŭ jam estas tie, ĉu?“ ŝi demandis.

„Jes.“

„Kaj vi dubas, ĉu?“

„Tute ege. Mi ankaŭ faru probon, pro konvinkigi!“

„Kian probon?“

„Vi ja certe ankaŭ havas krajonon ĉe vi, ĉu?“

„Jes.“

„Do prenu mian folion, kaj skribu sur la alian flankon, kion mi nun diktas al vi!“

„Bone! Mi havas la folion kaj la krajonon. Povas komenciĝi!“

Mi diktis:

„La obeema subskribinto konfesas per ĉi tio antaŭ la prokurecon de la Reĝa Saksuja Ŝtatjuĝistaro en Dresden pentante, ke ŝi, sur la Devil's Pulpit de la amerika ŝtato Colorado, kulpiĝis per ruza ĉantaĝo de 50 markoj, parole kaj skribe kvindek markoj, kaj pro tio —“

„Ĉesu, ĉesu! Ne plu!“ ŝia voĉo interrompis mian paroladon. „Miajn pekojn mi konfesu nur al vi, sed ne al la ŝtata prokureco, kiun mi deklaras tute nerajtigita pri ĉio, kio okazas sur la Diabla Katedro. Viaj kvindek markoj estas ekde nun la posedaĵo de miaj malsanuloj; tiel devas resti! Se necesas ankoraŭ pluaj proboj, do faru aliajn, sed ne tiajn!“

„Mi rezignas!“

„Do venu kaj petu pri mia pardono! Kion rilatas min, via ektrovo ne bezonas iajn pluajn pruvojn.“

„Do ni nun reeniros al nia restejo. Mi antaŭe ne venos longe al vi, sed ni renkontiĝos ĉe la akvo, ekstere antaŭ la valo.“

Kiam mi alvenis tie, ili ankoraŭ ne tieis. Daŭris kelkan tempon plu, ĝis ili alvenis.

„Ni devis lasi vin atendi“, mia edzino senkulpiĝis. „Ja gravis komfortigi ĉion por vi laŭeble bone.“

„Kion?“

„Vian kaŝaŭskultadan postenejon, la dometon, en kiu vi certe restos dum horoj aŭ boneble eĉ pli longe. Ĝi devis esti purigita. Tiam ni enigis sekajn foliojn, tiel multajn, ke vi povos komfortiĝi tiel, kiel la cirkonstancoj permesas tion. Ĉu ni nun grimpas supren?“

„Jes, sed nur ni du. La „Juna Aglo“ povas resti tie ĉi kaj atendi Pappermann:on, kiu alportu la urson. La besto troe pezas por unu; necesas du pro tio.“

La apaĉo konsentis. Li kuŝiĝis sur la muskon pro atendi la maljunan okcidentulon; sed ni du ekiris supren al la restejo.

Alveninte tie ni eksciis, ke Pappermann estis rigardinta nin de komenco ĝis fino. Li ankaŭ estis aŭdinta la pafon kaj tuj pensinta, ke ĝi estis celita al ia sovaĝa besto. Sed kia besto tio estis estinta, tion li ne sciis. Nun li ĝojis des pli pri tio, kaj rapide ekiris kun du muloj pro alporti la urson.

Ĉar gravis pro la suoj kaj la jutoj esti singarde, kaj ĉar la ĝisnuna gardisto estis foriĝinta, mi do unue certigis, ke nenio mankis al la ĉevaloj, kaj tiam ni grimpis supren al nia alte situanta aŭskultejo. De tie supre la elipso de la Devil's Pulpit estis tiel klare rigardeble sub ni, ke ne malfacilis al mi geometrie pruvi kaj klarigi al mia edzino, en kia maniero eblis, ke oni povis je fokuso tiel klare aŭdi ĉion, kion oni diris je la alia. Kiam tiam la urso estis alportita, la 'Juna Aglo' transprenis la taskon gardadi tie, kaj ni reengrimpis malsupren al la tendo, kie Pappermann klarigis al la Koretinjo detale, kiel oni ŝnurumu kaj fosu urspiedeĝojn en la teron, pro ke ili rapide moliĝis, sen ke ekenestis larvoj kaj vermoj. La ŝinkoj estis prizorge liberataj de ĉiu graso, rulataj en cindro kaj tiam ankaŭ ŝnurumataj, pro esti tenataj kaj kunprenotaj. Sed al la antaŭa kruraĵoj la maljuna okzidentulo faris alian, tre streĉigan procedon. Ili devis esti mangataj unue, kaj tial estis frapataj de li, certe plenan horon, per mallonga, dika batilo, kiun li skulptis el branĉo. Sed mi intertempe serĉis la diversajn herbojn, kiujn ĉiu konanto de la 'sovaĝa' okzidentulo estimas neellaseble, kiam li intencis komenti laŭde pri ĉirkaŭ lanco aŭ sub varmegaj ŝtonoj rostita ursviando. Tiel ĉiu estis okupata, sed pleje la Koretinjo, ĉar ŝi hodiaŭ ankaŭ bakis panon, tuj por tri aŭ kvar tagoj, kune kun bongustan rubusberan kakon, pro kiuj la berujoj estis amase en pleja proksimeco al nia tendo. Per tio la unua de Trinidad kunprenita farunuĵoj malpleniĝis, kaj la Koretinjo hastis pleni ĝin per la fluidigita ursograso. Ursograso fakte estas eminenta aĵo, kiu estas tre diverse uzata, kaj plibongustigas ĉiun rostaĵon, eĉ ĉian bakaĵon, kiel asertas spertuloj. Tiun eminentaĵon ĝi jam havis antaŭ longa tempo inter la indianoj, eĉ antaŭ kiam alvenis la blankuloj. Preskaŭ ĉiu urbo kaj ĉiu vilaĝo havis propran stalon aŭ kaĝon, en kiuj ursoj estis bridataj, nutrataj kaj dikigataj, pro poste esti buĉataj. —

La suoj ne venis tiun tagon, ankaŭ ne je la sekvinta. La 'Juna Aglo' kaj mi uzis tiun liberan tempon plej bone pligrandigi la vortprovizon, kiun mia edzino posedis pri la lingvo kaj esprimmaniero de la apaĉoj. Ŝi havis la deziron ĝojigi speciale Kolma-puŝin per tio.

Nur je la tria tago la atenditoj aperis, fakte je la vespero. Ni vidis ilin veni jam de for ekstere, trans fore situanta, senarba kresto. Ili rajdis unuope unu malantaŭ la alia, en tiel nomata anservico, tute tiel, kiel okaziĝis pli frue, kiam oni ankoraŭ nomis la okzidenton 'sovaĝa'. En tiu tempo ili sed estus tre certe evitintaj elekti la vojon trans tiu senarba monto, kiu donis al ili tiom da malmulta kovro, tiel ke oni tuj vidu ilin. Ĉar ne estis milita elirado, almenaŭ ne jam nun, ili ne jam estis ŝminkitaj per la farboj de la milito, per kiuj eblas ekzakte diferencigi la tribojn kaj naciojn klare unu de la alia. Sed tamen estis kelkaj rekoniloj, aparte rilate al iliaj lancoj kaj la jungilaroj, dekoro kaj kolbridoj de iliaj ĉevaloj, per kiuj mi ekkonis, ke tiuj antaŭ ni estis juta-indianoj, fakte en tre miksitaj kuniĝoj. Ni vidis — uzante kutiman esprimon — sovaĝajn, duonsovaĝajn kaj malsovaĝajn jutojn. Ili apartenis al la subtriboj de la Paho-jutoj, de la Teŝ-

jutaoj, de la Kapote-, Viminuĉ-, kaj Elkmountain-jutaoj, de la Jampo-, Pavango- kaj eĉ de la Sempis-jutaoj. Inter la kapote-jutaoj mi vidis maljunan, grizharan ĉefon, per kies aspekto mi tuj devis pensi pri Tusaga-saritŝ, la al mi konata ĉefo de la kapote-jutaoj, kiu tiutempe nur devigite amikiĝis al ni, sed nun, kiam li staris je la rando de sia tombo, reapartenis al niaj malamikoj.

Kiam la jutaoj atingis la kaldronecan valon, ni eksciis per ilia konduto, ke tiu loko estis sankta ankaŭ al ili. Ili iris en ĝin nur per sinreteneco. Ili eĉ kunalportis fajrolignon, pro povi ne damaĝi la arbajn kaj arbedajn arojn de la Devil's Pulpit. Kaj ili restis nur en la okcidenta parto; ili ne kuraĝis iri en la orientan parton, kie ni estis mortpafintaj la urson. Kaj, kio estis la plej grava aĵo al ni, ili restis ĉirkaŭ la diablan katedron nur en vasta cirklo. Neniu proksimiĝis al ĝi, kaj eĉ malpli iu el ili havis la kuraĝon grimpi sur ĝin. La intertraktadoj kaj interkonsiladoj ĉiukaze nur komenciĝu post la alveno de la suoj. Tiam kunestis ‚diversaj nacioj‘, kaj nur tiam estis permesata iri sur la katedron. Kio tiam estis interparolota, tion ni volis aŭdi, sed ne malgravaĵojn. Tial ni rezignis kaŝe aliri jam nun, kaj meti nin pro nura scivolo en la danĝeron esti elektovataj, sen ke ni povis gajni ian utilon per tio. Ni do restis je nia restejo kaj planis dece firdormi, ĉar ni ne povis scii, kiam ni denove estus havonta la ŝancon pro tio.

Je la vespero ni vidis malsupre bruli kelkajn fajrojn, kiuj sed estis tiel malgrandaj, ke ili ne sufiĉis al ni pro vidi la figurojn de la indianoj, kiuj sidis ĉe ili. Ankaŭ ĉio okazis tie malsupre tre mallaŭte, elstare mallaŭte. Ne esti brueto, kiu iĝis ĝis supre al nia altejo. Ni dormis bone. Nenio ĝenis nian ripozon. La neksta tago pasiĝis, sen ke la suoj venis. Sed je la tiam sekvintan matenon ni vidis, ke la elsenditaj postenuloj aperis pro anonci la alvenon de la atenditoj. Tiuj venis tute same en ansereca vico, kiel antaŭhieraŭ la jutaoj. Antaŭe rajdis tre maljuna, tra alta kaj tre maldika ĉefo, kiu lasis sian ĉevalon konduki de du normalaj indianoj, pro ke ĝi ne faris misan paŝon. Li ŝajnis havi ne plu ĉiujn siajn fortojn. Ke li tamen faris tian longan rajdadon konkludebligis, ke la penso, kiu nun kondukis lin al sudo, interne fanatikigis lin.

Li estis ricevata de la jutaoj per granda estimo. Nur kiam oni estis leviĝinta lin de la ĉevalo, oni vidis, kiel elstare longe, malvaste kaj maldike li estis. Se ne estus estinta luma tago, oni povis facile pensi, ke li estis fantomo. Tiu estis, kiel mi ekkonis jam baldaŭ poste, Kiktahan-ŝonka, la ‚Gardanta Hundo‘, kiu estis ĵurinta la pereon al la apaĉoj kaj ĉiuj iliaj amikoj. Oni vastigis kelkajn softajn kovrotukojn por li vid-al-vide antaŭ la jutaa ĉefo Tusaga-saritŝ, kaj sidigis lin tie kiel infanon. Malantaŭ li estis enbatataj kelkaj palisoj, pro ke li povis apogi sin sur ilin. Mi rigardis lin pripense tra la teleskopo. En tiaj homaj ruinoj kutime malamo kaj vengavido teniĝadas pli longe ol en sanaj, rezistkapablaj personoj.

Nun estis tempo al ni ekokupi nian aŭskultejon. La Koretinjo ja plej ŝate estus kunirinta; sed ŝi ne povis utili al mi, sed nur ĝeni min. Pappermann rezignis pri akompani min.

„Kion mi faru tie malsupre?“ li demandis. „Kiu volas kaŝaŭskulti la *indsmans*ojn, konu ilian lingvon pli bone, multe pli bone ol mi. Mi ja nomiĝas Makŝ Pappermann, kaj ja estas kun la pafilo en la mano certe ne neeminenta ulo; sed ĵus tie, kie komencas

lingvoj kaj dialektoj, mia saĝeco ĉesiĝas, komplete ĉesiĝas! Mi do restas ĉi supre ĉe nia Mrs. Burton kaj lasos por mi baki novan rubusberan kakon. Aŭ ĉu ne?”

Ŝi kapjesis.

Mi do iris kun la „Juna Aglo“ tra la arbaro malsupren laŭ la monto. Ni kunprenis niajn pafilojn, pro havi longadistancan armilon en la mano pro ĉiuj kazoj. Komprenblis per si mem, ke ni efikigis ĉian singardon ne lasi spurojn kaj ne esti vidata. Ĉar morgaŭ estis la tago, kiujn la du Santer:oj estis dirintaj al ni. Tiam ili verŝajne alvenis tie ĉi. Sed ankaŭ eblis, ke ili alvenis pli frue kaj kaŝe ĉirkaŭiris tie pro kaŝaŭskulti la indianojn antaŭ ke ili vedbliĝis antaŭ ili. Ni do iris malsupren nur je tiaj lokoj, kiujn ĉiu alia estus evitinta, kaj ke ni faris tion estis tre bone de ni, kiel ni tiam poste estis eltrovontaj. Alveninte malsupre ni tuj eniĝis en la densajn kreskaĵojn pro malaperi tiel rapide kiel eble.

Kiam ni estis atingintaj nian kaŝaŭskultejon kaj nian malgrandan insuldometon, mi vidis, ke mia edzino tie estis konvinkige pretiginta al ni tre bonan eblecon pro sidadi kaj kuŝadi. Sed unue ni ne jam uzis tion, ĉar ni ja nun estis sufiĉe proksime pro povi vidi pli detale al la ruĝuloj, kvankam ne per la nuraj okuloj, sed refoje tra mia teleskopo, kiun mi estis kunpreninta. Ni nombris ekzakte kvardek jutojn kaj kvardek suojn. Tiu nombro ŝajne do estis interkonsentita antaŭe. Ĉiukaze estis nur la ĉefaj kaj subaj estroj. La normalaj militistoj, do la faktaj trupoj, de kiuj la apaĉoj devis esti atakotaj, ne estis kunprenitaj tute ĝis tie ĉi. La du plej altrangajn ĉefojn mi jam menciis. Krom ili estis kvin subĉefoj de la suoj kaj kvin subĉefoj de la jutoj. La ceteraj estis homoj, kiuj estis eminentiĝintaj per ia maniero, kaj tial posedis la prifidon de la ĉefoj. Kio frapis miaj okuloj, tio estis, ke oni ne ĉirkaŭirigis la pacopipon tuj kaj por ĉiuj. Oni estis intersalutanta en tuta normala maniero, kaj tiam unue sidiĝis pro manĝado kaj ripozo. Antaŭ ĉiuj aĵoj mi rigardis Kiktahan-ŝonka:n kaj Tusaga-sarits:on. La aliaj nun estis pli malgravaj al mi. La jutaan ĉefon mi tuj rekonis, kiam mi direktigis mian teleskopon al li. Li estis estiĝinta maljune, multe pli maljune ol la sumo de liaj jaroj, kaj eksternormale faldethave. Tiaj homoj ja ne posedas tiun animan forton, kiu tenadas ankaŭ la eksteran junecon. La suo havis terurige elstaran, tre maldikan kaj, mi preskaŭ emas diri, tranĉilakran nazon, vastan, senlipan buŝon, profunde en iliaj ingoj estantajn okulojn kaj falsan, el multaj skalpoj kunmetitan perukon. Oni ne juĝu malŝateme pri siaj kunhomaro, sed kiam mi volas esti sincere, mi diru, ke tiu *indsman* ŝajnis al mi elstare naŭzige jam je la unua vido, kiun mi faris al li.

La manĝado daŭris sufiĉe longe, certe pli ol du plenajn horojn. Tiam la ĉefoj paŝis supren al la katedro. Kiktahan-ŝonka ne povis iri supren laŭ la ŝtupoj. Li estis tirata per la helpo de lazoj kaj plupuŝata de malsupre, ĝis li estis sur la altaĵo. Ekde tiu momento ni komencis aŭdi. La pacopipoj estis bruligataj. La plej alta ĉefo de la jutoj stariĝis, blovis la fumon al la ses direktoj kaj faris la unuan paroladon. La plej alta ĉefo de la suoj ne povis leviĝi; sed li ripetis la samajn elpuŝojn de la fumo kaj tiam paroladis sidante. La subĉefoj tiam agis same, unu post la alia. Se mi volus skribi tie ĉi la enhavon de tiuj dek du paroladoj, mi skribus preskaŭ plenan tagon pro finiĝi tion. Sed tamen la paroladoj nur estis la enkondukon al la intertraktadoj, kiuj devis esti farotaj. Oni estis

planintaj tri plenajn tagojn pro tio, kiujn ni do devis pasigi tie ĉi en la dometo, pro eble ne rezigne preterkapti ion. Tio terurigis min jam nun antaŭe! Sed feliĉe jam tre baldaŭ ekokazis grava kaŭzo mallongigi tiun longan tempon tiel, ke la tri tagoj estiĝis nur tri horoj, kaj tiu kaŭzo — estis mi mem.

Sed tiuj paroladoj estis interesige, ege interesige; tion mi povas konfesi. Ili ĉiuj komenciĝis per la aserto, ke la apaĉoj kaj la kun ili aliancataj nacioj estus la plej fiaj homoj, kiujn oni povis elpensi, sed ke la pinto de tia fiĉo estis atingita nur de Winnetou kaj Old Shatterhand, lia amiko. Kaj por tiu Winnetou oni nun volis konstrui monumenton! Sur la monto, kiu estis nomita laŭ li! Monumento el pura, brila oro! Kaj tiun oron liveru ĉiuj, ĉiuj triboj de la indianoj! El ĉiuj *bonanza*-oj, rezervejoj kaj *nugget*-aj kaŝejoj, kiujn oni tiel zorgeme sekrete fortendis de la palvizaĝoj dum jarcentoj! Por tiu unu, fia homo, kiun oni neniam nomis alie kiel nur la hundo, la kojoto, la Pimo, la apaĉo! Kaj de kiu tiu monumento devis esti farata? De skulptisto kaj de pentristo! De Young Surehand kaj Young Apanatŝka, kies patroj estis perfidistoj de la tuta ruĝa raso kaj senvaloraj kreaĵoj de la palvizaĝoj! Tiu monumento nun intertempe estis pentrita sur tolon kaj kungluita el argilo. Ĝi estis eksponata ĉe la Mount Winnetou, kaj la ĉefoj, la plej famaj viroj kaj virinoj de ĉiuj ruĝaj nacioj estis invititaj veni tien pro vidi tiujn figurojn kaj bildojn. Eĉ Old Shatterhand estis postulita, la fava hundo!

Tiu freneza superiĝo de la apaĉoj devis esti malebligata! Ili eksciis, ke oni ja povus starigi oran monumenton pro jutoa aŭ sua militisto, sed ne pro fiblekanta fihundo de la Rio Pecos! Pro intertraktadi la kiamon kaj la kielon, pro tio oni estis kunveninta tie ĉi ĉe la „Katedro de la Diablo“. Kaj kio estis decidota tie, tion oni faru, eĉ se la tuta indiana raso pereus per tio komplete!

Tion oni estis interparolinta; tiam ekestis ĝeno, kiu estis vidata ne nur de la ruĝuloj, sed ankaŭ de ni du. Ĝi venis en la figuro de homo paŝadante laŭ la rivereto, kaj tiu homo estis neniu alia, sed Sebulon L. Enters. Li havis spronojn je la botoj, sed ne kunhavis ĉevalon. Li surhavis pafilon kaj estis ekipita ekzakte tiel, kiel ankoraŭ antaŭ tridek jaroj okcidentulo kutime estis ekipata. La suoj konis lin. Ili ne malhelpis al li alveni. Ili kondukis lin al la katedro. Li devis grimpi malsupren. Tion ni vidis. Kaj nun ni ankaŭ reaŭdis voĉojn.

„Kiu estas tiu palvizaĝo?“ Tusaga-saritŝ demandis.

„Viro, kiun mi konas“ Kiktahan-ŝonka respondis. „Mi venigis lin al la „Katedro de la Diablo“. Li devis veni nur morgaŭ. Kial li venas jam hodiaŭ?“

Tiu demando estis direktita al Sebulon. Ĝi sonis ne vere ĝentile. La indiano kutime traktas la blankulon, kiun li uzas kiel spionon, ĉiam nur malestime. Sebulon respondis:

„Mi devis hasti laŭeble baldaŭ veni tien ĉi pro averti vin.“

„Pri kiu?“

„Pri via plej ega malamiko, pri Old Shatterhand.“

„Uf, uf, uf, uf!“ eksonis ĉirkaŭe en la rondo, kaj ankaŭ Kiktahan-ŝonka mem elvokis:

„Uf, uf! Old Shatterhand! Averti pri li? Kial?“

„Li venos tien ĉi.“

„Uf, uf! De kie vi scias tion?“

„Li diris tion al mi.“

„Do vi certe vidis lin, ĉu? Kaj interparolis kun li, ĉu?“

„Jes.“

„Kie?“

„Ĉe la falanta akvo de la Niagara.“

„Uf! Ni scias, ke li laŭdire venos. Sed ke li jam venis, tion ni ne sciis. Kaj li venas al la Devil's Pulpit, ĉu?“

„Jes.“

„Kion li volas fari tie ĉi?“

„Kaŝaŭskulti vin.“

„Uf, uf! Tio ja sonas, kvazaŭ li scias, kion ni volas fari tie ĉi!“

„Li scias.“

„De kiu?“

„Tion li ne diris. Li forvojaĝis. Ni sekvis malantaŭe. Ni trovis lian spuron en Trinidad. Li ankaŭ foriĝis de tie, verŝajne rekte tien ĉi.“

„Uf, uf, uf, uf!“ denove sonis en la rondo, kaj Kiktahan-ŝonka elvokis ĉagrenite:

„Ĉu tiu hundo do ne jam estas sufiĉe aĝe perdi la akrecon de la okulo, de la oreloj kaj de la nazo? Ĉu li ne povis resti tie, trans la granda akvo en sia fiodoranta *wigwam*?“

„Kune kun lia edzino!“ Sebulon aligis.

„Ĉu lia *squam*, vi diras? — Ĉu ŝi estas ĉe li?“

„Jes.“

„Ĉu vere? Ĉu tio veras?“

„Memkompreneble! Mi ja diris tion!“

„Ŝi kunestis ĉe la falo de la Niagara, ĉu?“

„Jes. Kaj ankaŭ en Trinidad ŝi estis ĉe li. Ni eksciis tion, kiam ni iris tien kaj demandis pri li.“

„Uf, uf! Tio estas bona signo, tre bona signo por ni! Lia kapo malfortiĝis! Li estas maljunulo, malfortiĝinta maljunulo! Kiu peze kunportas sian *squam*:on pene trans la akvo kaj en la sovaĝan okcidenton, tiu estas freneza, tiu ne plu povas damaĝi al iu. Li ĉiukaze venu. Ni ne timas lin. Li estos ligata al la torturofosto, kaj lian virinon mi igos mian *squam*:on!“

Tiam Tusaga-saristŝ, la plej alta ĉefo de la juatoj ekparolis:

„Mia frato ne parolu tro rapide! Old Shatterhand konas sian *squam*:on, sed vi konas ŝin ne. Se li estas kunpreninta ŝin, li tutcerte scias ekzakte, ke li povas riski tion, sen ke li faras damaĝon al si per tio. Li eble maljuniĝis; sed tiel li ja nur atingis la aĝon, en kiu oni saĝas kaj estiĝas duoble singarde kaj pripensante, sed ne tiun, en kiu normalaj homoj estiĝas infanece. Estas boneble, ke ni timu lin nun eĉ pli ol antaŭe, kiam li estis pli ol tridek somerojn pli maljune!“

„Kaj li ne estas sole!“ Sebulon konsentis.

„Kiu estas ĉe li?“ Kiktahan-ŝonka demandis.

„Maljuna, sperta okcidentulo kun la nomo Max Pappermann.“

„Uf! Mi aŭdis pri iu kun tiu nomo. La duono de lia vizaĝo estas blua.“

„Tiu li estas!“

„Tiu, ĉi tiu! Li savis la vivon de mia plej eminenta kontraŭulo en la propra tribo, de la suo Vakon. La malica spirito neigu lin! Li estas brava kaj samtempe ruza. Kiam li estas ĉe Old Shatterhand, ni devas timi lin!“

„Kaj ankaŭ alia estas ĉe li“ Sebulon pluis. „Fakte juna meskalero-apaĉo, kiu nomiĝas la „Juna Aglo““.

„Ĉu nu tiu „Juna Aglo“, kiu iris al la palvizaĝoj pro lerni flugi?“

„Tion mi ne scias. Sed mi aŭdis en Trinidad, ke li estis estinta kvar jarojn ĉe la palvizaĝoj, kaj ke li nun reeniras al sia tribo.“

„Do estas li! Li estas instruito de Vakon. Li sendas multajn leterojn kaj ricevas multajn resendaĵojn. Li estas unu el la unuaj inter tiuj, kiuj nomiĝas „junindianoj“, kaj parolas pri nenio alia sed homareco kaj edukado kaj pardonado kaj amo. Kaj li ankaŭ estas unu el la unuaj de la klano Winnetou. Ĉiukaze li laŭdire estas sangofrato de Winnetou. Kiam li troviĝas ĉe Old Shatterhand, ni ĉiuj ege klopodu igi tiujn tri homojn kaj la *squaw*:on sub nian forton. Kie estas via ĉevalo?“

„Trans la monto ĉe mia frato“, Sebulon respondis. „Li restis tie kun la ĉevaloj. Sed mi kaŝiris tien ĉi piede pro serĉi spurojn kaj esplori la pejzaĝon.“

„Laŭ kiu vojo vi iris de Trinidad?“

„Ni venis pasinte la lagon Kanubi.“

„Ĉu vi trovis spurojn de Old Shatterhand sur tiu vojo?“

„Ne. Sed spurojn de multaj virinoj, kiuj restadis ĉe la lago.“

„Tuj estis la delogitaj virinoj de nia propra tribo, kiuj nomiĝas „junindianoj“. Ili ankaŭ migras al la Mount Winnetou pro vidi la monumenton kaj fordoni iliajn *nugget*:ojn por ĝi. Ni ne povas malebligi, ke ili faras tion; sed ni punos la apaĉojn pro tio. Ĉu Old Shatterhand parolis pri la Mount Winnetou?“

„Ne.“

„Ĉu ankaŭ ne pri la vojo, laŭ kiu li volis iri?“

„Ankaŭ ne. Ni nur eksciis, ke li intencis iri al la Devil's Pulpit pro vidi tie Kiktahan-ŝonka:n, la ĉefon de la suoj.“

„Do li ankoraŭ estas la netediĝema, ruza esploristo, kiu li estis eksateme! Sed tiun fojon li ne sukcesos fuĝi de la torturofosto, de kiu li tiel ofte sukcesis fuĝi. Kiam li proksimiĝos, li povas veni nur de la orienta altaĵo, de kiu certe ankaŭ venis vi, ĉu?“

„Jes.“

„Mi tuj lasos esploradi la tutan ĉirkaŭon tie ĉi. Vi sed reeniru al via frato kaj irigu lin tien ĉi! La interkonsilado estas paŭzata, ĝis ni konvinkiĝis, ke Old Shatterhand ne troviĝas en la proksimo.“

Sebulon L. Enters foriĝis. Ni vidis lin reeniri laŭ la vojo, sur kiu li estis veninta. Estis la nia. Kiel bone do, ke ni estis estintaj tiel singarde eviti videblajn spurojn. Ankaŭ Tusaga-saritŝ forlasis la katedron kun ĉiuj subĉejoj. Ili ĉiuj paŝis malsupren pro partopreni en la esplorado. Nur Kiktahan-ŝonka sole restis tie. Do kaŝe foriris kvardek suoj kaj kvardek jutoj pro serĉi nin. Tio ne estis etaĵo. Mi ja pensis nek Pappermann:on nek mian edzinon kapable fari la sensingardaĵon forlasi ilian kaŝejon dum nia foresto,

sed la plej eta kaj malgranda cirkonstanco povis esti ĝi kaŭzo de la ektruvo, ke sekreta vojeto ankoraŭ pluiris de la lageto. Kaj kion rilatis nin mem, ni neniukaze devis senti nin tiel sekure, ke ĉiu ektruvo estis simple neeble. Bezonis esti nur unu sola inter la okdek indianoj, kiuj ne havis timon antaŭ la ‚malica spirito‘ kaj ne evitemis iri en la orientan parton de la elipso, tiukaze li nepre devis ekvidi niajn spurojn. Necesis diri al mia kunulo kio okazu en tia kazo. Ĝis nun ni ĉiam estis nur parolintaj en la angla kun li, per la simpla kaŭzo, ke mia edzino komprenis tute nenian indianan dialekton, kaj ke ankaŭ Pappermann povis maksimume esprimiĝi en la duone angla, duone indiana argoto. Sed nun, kiam ni estis sole, mi povis fari la ĝojon al la ‚Juna Aglo‘ aŭdi la lingvon de lia patrino.

„Ĉu mia juna frato komprenis ĉion, kio estis parolata?“ mi demandis lin.

„Mi aŭdis ĉion“, li respondis.

„Ĉu li scias, ke nun pli ol cent kaj duonan cento da okuloj nun serĉas nin?“

„Mi scias.“

„Ĉu vi pensas, ke oni trovos nin?“

„Ne.“

„Mi same. Sed singardema militisto pretiĝu por ĉio. Pripensadas du kazoj. Ĉu mia juna frato scias, pri kiuj mi parolas?“

„Oni povas trovi nin tie ĉi, kaj oni povas ektrovi nian restejon tie supre.“

„Tute ĝuste! Do necesas scii, kiel ni agu en ambaŭ kazoj. Se oni trovos nin tie ĉi, estus nepardonebla malsaĝaĵo fuĝi supren al Pappermann kaj mia edzino, kaj lasi nin sieĝadi de la jutoj kaj la suoj. Mia juna frato tiukaze tuj devus hasti supren kaj elkonduki ilin ambaŭ kune kun la ĉevaloj kaj la muloj. Mi sed estus intertempe okupigantaj la ruĝulojn per mia pafilo. La eliro el tiu valo mallarĝas. Neniu el ili povus eliri sen esti trafata de mia kuglo.“

„Kaj kio, se oni ektrovas ne nin, sed nian restejon?“ li demandis.

„Ankaŭ en tiu kazo mi ne malkvietus. Pappermann ja gardadas. Li senkondiĉe vidis, ke ĉiuj ruĝuloj subite foriĝis, ke ili eliris pro esplori. Li do certe kaŝiĝis kun sia pafilo ĉe la lageto kaj singardas. Ankaŭ la tiea eliro tre mallarĝas. Sufiĉas unu sola viro retenita tutan armeon. Kaj ni du tiukaze povus iĝi malantaŭ la dorso de la *indsmen*-oj. Ni do ne havas la plej etan kaŭzon afliktiĝi. Tial ni trankvile atendu, kio okazas!“

Daŭris pli ol unu horo, ĝis la unua indiano revenis. Lin sekvis unu post la alia la aliaj. Oni estis trovinta nenion. Sed oni nun ne pensis, ke oni konduku pli singarde. Oni surpostenigis gardistojn, fakte tro tarde. Sed bedaŭrinde ili ankaŭ staris tie, kie ni nepre devis pasi, kiam ni volis foriĝi.

Tiam rajde alvenis la du ‚Enters:oj‘. Do oni rekomencis la interkonsiladon. La ĉefoj repaŝis sur la katedron. Sed ili ne parolis laŭte, sed tiel, ke ni aŭdis iliajn voĉojn kiel mallauĝigita murmureto, certe pro la du palvizaĝoj, kiujn oni volis uzi, sen lasi ilin scii ion. Kiam oni tiam estis decidinta, kiun taskon ili devis fari, oni venigis ilin sur la katedron, kaj Kiktahan-ŝonka demandis ilin en sia jam menciita, ne vere estimanta sonon:

„Vi ankoraŭ scias tute ekzakte, kion mi interparolis kun vi, ĉu?“

„Tute ekzakte“, Sebulon respondis, kiu ĝenerale ŝajnis esti la ĉefparolanto.

„Kaj ĉu vi ankoraŭ hodiaŭ pretas plenumigi la kondiĉojn, kiuj estis interkonsentitaj inter vi kaj ni?“

„Jes, ankoraŭ hodiaŭ.“

„Do nun kroma tasko ekestas al vi, fakte peli Old Shatterhand:on kaj lian edzinon sub nian forton. Ĉu vi pretas por tio?“

„Nur, se valoras la penon.“

„Valoras!“

„Kiom vi pagos pro ŝi kaj li?“

„Multe, tre multe! Sed hodiaŭ ne jam estas la tempo paroli pri tiu prezo. Kiam ni kaptos lin mem, ni memkompreneble pagos nenion al vi. Ni restos tie ĉi ankoraŭ tri plenajn tagojn kaj atentiĝos. Se li venos, li tutcerte ne sukcesos fuĝi de ni; ni kaptos lin. Pro tio vi ricevos nenion. Sed ĉar li forlasis Trinidad:on jam antaŭ vi, kaj ankoraŭ ne estas tie ĉi, ni estas konvinkitaj, ke li ŝanĝis sian planon kaj tute ne rajdis al la Devil's Pulpit. Pli vere li trovis niajn virinojn ĉe la lago Kanubi, kiuj ja tiel frenezas ŝategi lin kaj Winnetou:n, kaj tiel plaĉegis al la maljuna viro lasi sin laŭdi kaj adori de la fivirinoj. Li iris kun ili.“

„Tio eblas, tre facile eblas“, Sebulon rapide diris. „Ni ja vidis ankaŭ kelkajn virajn spurojn.“

„Tio sufiĉas! Estis li. Kaj nun estas tasko via akiri la prezon, kion ni donos al vi pro lia ekkapto. Feliĉe ni konas la nekstan celon, al kiuj tiuj virinoj nun rajdas. Fakte estas la Tavuntsits-pajav. Ĉu vi konas ĝin?“

„Ne.“

„Mia fama frato Tusaga-saritŝ konas ĝin tre bone kaj tuj priskribos la vojon al vi tien.“

Ankaŭ mi neniam aŭdis pri iu Tavuntsits-pajav, kaj do tial atentiĝis akre, pro nun ne miskompreni unu vorton. La plejaltranga ĉefo komencis nun la priskribadon de la vojo tien. Li faris tion tre malkoncize, kaj oni imagu mian surpriziĝon kaj mian ĝojon, kiam mi fine ekkonis, ke tiu Tavuntsits-pajav estis neniu alia monto sed la Nugget-tsil, al kiu ja volis iri ankaŭ ni! La fratoj Enters faris kelkajn notojn en iliajn libretojn; tiam Kikthan-ŝonka pluigis:

„Vi do rajdos tien pro igi vin malantaŭ Old Shatterhand:on, kaj neniam lasi lin foriri. Ĉu vi pensas vin esti kapable pro tio?“

„Tutcerte! Sed kiel ni transigu lin al vi? Kiam kaj kien? Kaj ĉu li sekvos nin libervole?“

„Li sekvos. Ĉu la nomo Vikonte-mini estas konata al vi?“

„Ne.“

„Tien ni irados de tie ĉi, pro unuiĝi kun la komanĉoj kaj la kajovajoj kontraŭ la apaĉoj. Vi ja ne malkaŝu tion al li, sed vi nur diru al li, ke, kiel vi eksciis, tie kuniros la kajovajoj kaj la komanĉoj. Lia eminenta kaj neregebla scivolemo logos lin rajdi tien pro kaŝe aliri kaj aŭskulti nin. Tiam ni ekkaptos lin.“

„Kaj nia rekompenco, ĉu?“

„Tiun ni preparolos, kiam vi venos kaj anoncos, ke li proksimiĝas.“

„Kaj kio, se ni ne interkonsentiĝos?“
 „Tiukaze vi bezonas nur averti lin, tiam ni ne ekhavos lin!“
 „Kial vi ne diras la prezon al ni jam hodiaŭ?“
 „Ĉar ni hodiaŭ tute ne scias, per kio ni poste pagos pro li, ĉu per bestoj aŭ per *nugget*-oj aŭ per varoj, armiloj kaj aĵoj, kiujn ni estos akirintaj.“
 „Ni kredas tion.“
 „Do nun estas permesata al vi foriri. Ni konsilas al vi ne perdi unu horon pro atingi Old Shatterhand: on laŭeble baldaŭ. Des pli rapide kaj konscience vi agas, des pli certas la sukceso kaj des pli grandos la rekompenco.“
 Ili iris malsupren de la ,katedro‘ kaj paŝis al iliaj ĉevaloj. Hariman F. Enters ne estis parolinta unu vorton dum la tuta tempo. La ĉefoj silentis, ĝis ili vidis la du fratojn forrajdi. Tiam diris la plej altranga ĉefo de la juatoj nur tiun unu vorton:
 „Fiuloj!“
 „Friponoj!“ Kiktahan-ŝonka aligis. „Ili ne valoras la alkraĉon! Ĉu mia frato do kredas, ke ili ricevos pro ilia perfido nur tiom, kiom valoras herbotigo aŭ eltirita birdoplumo?“
 „Kaj la tuta, granda negoco, kion ili volas fari kun vi kaj ni, ĉu —?“ Tusaga-saritŝ demandis.
 „Ne havigos ilin unu solan ĉevalharon“, la maljuna suo ridis. „Ili pagos la prezon; sed ni tenos, kion ni havas. Ĉu mia ruĝa frato konsentas?“
 „Jes. Mia frato estas tre ruze!“
 „*Pshaw!* Oni ne bezonas ruzecon pro trompi palvizaĝon!“
 „Sed la perfidistoj postulos, ke ni plenumigos niajn promesojn kaj pagi al ili la prezon.“
 „Tion ili faros ne. Kiu ne vivas plu, ne povas fari postulojn. Ĉu mia ruĝa frato ankaŭ konsentans pri tio?“
 „Jes.“
 „Kaj ankaŭ la aliaj, ĉu?“
 „Jes, jes, jes, jes!“ oni vokis ĉie en la rondo.
 Tiam mi ne povis regi min plu; mi vokis per laŭta voĉo la saman vorton:
 „*Sitŝepi* — Fiuloj!“
 Sekvis profunda silento. Tiam mi aŭdis:
 „*Uf, uf — uf, uf!* Kiu estis tio? Kio estis tio? De kie venis tio?“
 Mi metis la teleskopon al la okuloj kaj vidis, ke ili movis la kapojn kaj vidis al ĉiuj flankoj.
 „*Ŝikŝitŝe-lagtŝa* — Friponoj!“ mi aligis same laŭte.
 Denove profunda silento. Sed mi vidis, ke ili leviĝis de iliaj sidlokoj, unu post la alia. Eĉ la longega Kiktahan-ŝonka stariĝis.
 „Ankaŭ vi ne valoras la alkraĉon!“ mi pluis.
 Denove profunda silento. Tiam ni aŭdis la duonlaŭtan, hastan voĉon de la maljuna alta suo:
 „*Uf, uf!* Tio ne estas homo!“

„Ne homo!“ Tusaga-saritŝ konsentis.

„Ĉu mia ruĝa frato scias, kion oni povas legi sur malnovaj *wampum*:oj pri la ,Katedro de la Diablo‘, sur kiu ni troviĝas?“

„Jes.“

„Ke tie ĉi la bona spirito aŭdas ĉion, kion la malica spirito diras?“

„Jes.“

„Kaj ke li punas lin pro tio, ĉu?“

„Eĉ tre rigide! Plej ofte per la morto!“

„Ĉu estis ĝi, kiu nun parolis, la bona spirito? Kio farendas? Mi ne restas tie ĉi!“

„Mi ankaŭ ne!“

„Foriĝu!“ mi ordonis al ili. „For, for!“

Tio efikiĝis tuj. Ili ĉiuj kuris kaj saltis malsupren laŭ la ŝtupoj en la neksta momento. Nur Kiktahan-ŝonka ne povis fari tion. Kaj kvankam li estis ĵus tiu, kiu timis plej multe.

„Helpu min; helpu min!“ li vokegis. „Mi volas malsupren, mi ankaŭ, mi ankaŭ!“

Sed la ĉefoj tre hastis. Ili ne helpis al li. Devis veni kelkaj aliaj pro porti iliajn plej-altrangulon malsupren. Dum tio li perdis la skalpoperukon. Li tute ne atentis pri tio. Ĝi devis esti portata malantaŭ li, ĝis li atingis sian ĉevalon. Tiam li surmetis ĝin kaj faris la ordonon tuj ekforiri de tie kaj forlasi la Devil’s Pulpit:on, kies prirespekto nun estis ĉiukaze kreskiĝinta en maniero, ke ĝi nun valoris dekope pli sankte ol antaŭe. Oni nun nur okupiĝis laŭeble rapide foriĝi. Oni eĉ rezignis pri atendi Old Shatterhand:on pro kapti lin tie ĉi. La postenuloj kaj gardistoj estis reenvokataj, kaj tiam ili forrajdis, ĉiuj okdek, anserovice, kiel ili estis venintaj.

Dum ni vidis post ili, estis gaja rideto sur la lipoj de la ,Juna Aglo‘, kaj mi kredas, ke mi same ne ploris.

„Tiu venko ĝojas min plie“, li diris, „ol ni estus interbatalintaj kun mortbatis ilin ĉiujn. Estas venko de la scienco, ne de la sangokovrita *tomahawk*.“

„Ĉu tiu fako de la scienco estas konata al vi?“ mi demandis lin.

„Jes. Mi devis konatiĝi al ĝi. La akustiko apartenas al la fako pri la aero. Mi iris al la palvizaĝoj pro studadi aerostatikon kaj aviadon. Mi scias, ke jam la antikaj asiroj, babilonoj kaj egiptoj konis la sekreton klare aŭdi je unu punkto, kio estas parolata je alia, fore malproksima. Mi estas tiel ĝoje kaj fiere, ke mi hodiaŭ eksciis, ke la prauloj de la hodiaŭa ruĝa raso per tiu scio ne estis malpli sukcese ol tiuj popoloj. Estas nia devo ĉion, kion ni perdis ekde tiam, revoki en la vekigantan animon de nia nacio. Ni petas la grandan, bonan Manitou:n doni al ni la forton kaj gajecon pro tiu grava kaj bela laboro!“

Estis la unua fojo, ke li libere esprimiĝis kaj parolis en tiu maniero. Mi neniukaze miris pri tio, kion mi aŭdis. Li estis silentema, alte talentita juna viro. Kaj li bezonis la necesan energion atingi ankaŭ nekutimitaĵojn. En lia vizaĝo nun estis varma, preskaŭ suneca brilo, tiel delikate dolĉa kaj simpatia, kiel ĝi ofte traĝis kaj lumiĝis en la trajtoj de mia glora Winnetou. Estis al mi, kvazaŭ la ,Juna Aglo‘ en tiu momento estis similiĝinta al mia neforgesebla ruĝa amiko, preskaŭ kiel frato kaj frato!

Kiam la lasta de la okdek indianoj estis malaperinta, ni forlasis nian kaŝaŭskultejon. Sed ni ne tuj reeniris supren, sed unue iris en la antaŭan parton de la valo, kie la *indsman*:oj estis estintaj kaj paŝadis sur tiu loko pro ekvidi, ĉu ni ne povis legi ion je iliaj spuroj, kio eble estis utile al ni. Estis nenio. Sed kiam mi fine denove paŝis sur la Pulpit:on, kie estis sidintaj la ĉefoj, mi vidis sur unu el la ŝtupoj, tute en la malantaŭa angulo aĵon, kiu tutcerte ne estis estinta tie antaŭ la alveno de la indianoj, ĉar ĝi alikaze estus certe rimarkita de mi. Mi prenis kaj rigardis ĝin. Estis du malgrandaj, dolĉaj hundopiedetoj, sed fakte ne nur la ungoj, sed la piedetoj, glate detranĉitaj kaj je la tranĉrandoj per cerva tendeno tre zorge kunkudritaj, tiel ke ili formis duoblan maneton, kies fingroj montris en la kontraŭajn direktojn. Mi montris ĝin al la „Juna Aglo“.

„Medicinaĵo!“ li elvokis.

„Tre verŝajne! — Sed kies medicinaĵo?“ mi demandis.

„Kiktahan-ŝonka!“

„Ni esperu tion! Sed kiel li povis perdi ĝin? Oni ja kutime portas la medicinaĵojn en la fermita medcinsaketo! Estas piedoj de hundo, ne de vulpo aŭ lupo, kaj la ĉefo de la suoj nomiĝas la „Gardanta Hundo“. Mi do ne dubas, ke estas li, kiu perdis ilin. Sed kiel estis eble, ke tio okazis? Mia juna ruĝa frato esploru!“

Mi donis ilin al li. Li rigardis ilin tre atente, tiam redonis ilin al mi kaj respondis:

„Tiu medicinaĵo ne troviĝis en la medcinsaketo, sed ĝi estis kudrita al la zono. Oni vidas la pikojn tre klare. Ĝi estis deŝirata, kiam oni tiris la ĉefon per lazo trans la ŝtupoj, aŭ kiam oni helpis al li veni malsupre. Tiu trovo estas eksterordinare grava!“

„Tutcerte, sed ankaŭ danĝera. Kiam Kiktahan-ŝonka ekrimarkos sian perdon baldaŭ, li senkondiĉe revenos tien ĉi pro serĉi ĝin. Se li ekrimarkos ĝin pli malfrue, li certe ne scios ekzakte kie li perdis la medicinaĵon, ĉu tie ĉi aŭ pli poste survoje. Sed neniukaze ni rajtas resti nun pli longe tie ĉi. Ni iru!“

Mi prizorge enpoŝigis la medicinaĵon. Tiam ni forlasis la lokon kaj suprengrimis al nia restejo. Ni estis rigarditaj de tie tiel akre, ke Pappermann sciis, ke ni venis. Li alkondukis la ĉevalojn al ni, pro ke ne necesis al ni iri tra la akvo de la lageto.

„Okaziĝis tre rapide, frape rapide!“ li diris. „Ĉu ili revenos?“

„Ne, esperinde ne“, mi respondis.

„Strange! Alikaze oni kutime interkonsiladas tagojn longe! Kial ili foriris tiel rapide? Kaj ĉu vi elaŭskultis ion?“

„Atendu, ĝis ni enestas ĉe mia edzino! Tiu volas scii la samon!“

Tio tre ĝustis. Ŝi vidis al ni, kiam ni venis, tiel scivole, ke mi ne havis la kuraĝon atendigi ŝin eĉ ne momenton, sed tuj vokis al ŝi:

„Sukcesis! Ĉio sukcesis!“

„Ĉu vere — vere?“ ŝi demandis. „Do deĉevaliĝu, sidiĝu tien ĉi kaj rakontu!“

Dum tio ŝi ankaŭ mem jam sidiĝis sur la lokon flanke de si, kie mi, kiel obeema edzo, devis plej rapide sidiĝi. Mi agis laŭ tiu ordono kaj mansignis al la „Juna Aglo“ intertempe grimpi sur la altaĵon kaj gardadi, pro ke mi tuj eksciis, se Kiktahan-ŝonka revenis. Mi faris mian raporton laŭeble koncize. Kiam mi estis finiginta ĝin, la Koretinjo per sia energia, rapide decidema maniero salte reekstaris kaj vokis:

„Do ni paku, paku! Ni tuj ekforiru!“
 Dum tio ŝi jam ekprenis kuirpoton kaj kafmuelilon. Sed mi restis sidante kaj demandis:

„Kien?“
 „Malantaŭ la du Enters:oj!“
 „Ĉu vi sole?“
 „Ĉu sole? — Mi? — Kial?“
 „Nu, se vi volas foriri, vi do faru tion sole! Mi fakte restas tie ĉi.“
 „Kio ankoraŭ farendas tie ĉi?“
 „Nenio.“
 „Kaj tiukaze vi volas resti, ĉu?“ Ŝi estis mirigite. Ŝi turniĝis al Pappermann: „Nenio! Kaj tamen li volas resti! Ĉu Vi komprenas tion, *Mr. Pappermann*?“
 „Almenaŭ ne jam tute“, tiu respondis. „Sed se li volas ankoraŭ atendi, li certe havas siajn kaŭzojn, kaj kontraŭ tiuj certe nenio estos farebla!“
 „Ĉu kaŭzojn? Hm! Tiujn li havas ĉiam! Almenaŭ mi ne iam estis vidinta lin sen iaj kaŭzoj!“
 „Ĉu ili taŭgas aŭ ĉu ili taŭgas ne?“ la maljunulo demandis.
 „Hm! Ili preskaŭ ĉiam gravis!“
 „Nu do! Do pro la volo de Dio residiĝu kaj fidu pri tiu viro! Li scias, kion li volas. Ni ankoraŭ restos tie ĉi.“
 „Kiel longe plu?“
 „Verŝajne ĝis morgaŭ frue.“
 „Ĉu tio veras?“ ŝi demandis min.
 „Jes“, mi kapjesis.
 „Do ĉu vi volas lasi la du Enters:ojn forkuri?“
 „Almenaŭ hodiaŭ, sed ne pli longe plu. Mi ja konas ilian vojon! Aŭ ĉu vi deziras, ke ni atingas ilin jam hodiaŭ kaj tiam peniĝas kunhavi ilin? Jes, ni bezonas ilin; ili estas la fontoj je certaj aĵoj, el kiuj ni ĉerpos; sed tamen mi pensas, ke ne necesas havi ilin ĉe ni tagon kaj nokton kaj ĉiam. Almenaŭ al mi tiu estus ĝene.“
 „Ankaŭ al mi. Vi pravas.“
 „Bele! Ni do ekrajdos nur morgaŭ frue. Estas ĉiam libera decido al ni atingi ilin.“
 Pri tio ŝi konsentis. Ne necesis al ni hasti. Ni povis pretiĝi trankvile pri la sekvonta rajdado. El la indianoj neniu revenis. La „Gardanta Hundo“ do ne jam ekrimarkis sian perdon. Kiel grave tiu perdo estis, tion kapablas pritaksi nur tiu, kiu estas instruita pri la origino, la signifo kaj la valoro de indiana „medicino“. La sekvintaj okazaĵoj montros, kiel la perdiĝoj de la du hundopiedetoj efikiĝis al la maljuna Kiktahan-ŝonka. —